

EL POPOLA ĈINIO


中國新道

5

1999

ISSN 0032 - 4361

Ĉinoj kaj televido
Ŝanĝiĝo de loĝkondiĉoj en Pekino
Urbeto de *tajĝiĉjŭan*



Reĝa kastelo kaj katedralo sur la monteto Vavel de BENEDYKT WILKOWICZ (Pollando)

Ĉi-febuare, ĉe la Printempa Festo, la Centra Nacimuzika Filharmonio de Ĉinio vizitis Eŭropon. Kun tradiciaj muzikaĵoj ĝi ludis refoje en Vieno, Berlino kaj Kopenhago kaj estis aplaŭdata de la aŭskultantoj. Eble ankaŭ iuj el niaj legantoj ĝuis ĝian prezentadon. Ĝi estas renoma en Ĉinio pro tio, ke ĝi heredas kaj disvolvas la tradician ĉinan muzikon. La legantoj informiĝos pri tio per la artikolo "Brilanta ĉina muziko".

Krom "Studentoj kaj ilia laborserĉado" en la rubriko "Temo proponita de legantoj", estas ankaŭ aliaj artikoloj, kiujn ni aperigis laŭ proponoj de legantoj, ekz. pri ĉinoj kaj televido, pri konstruado de loĝdomoj en Pekino, familia eduko en antikveco, katolika katedralo kaj kuracmetodo kontraŭ sendormeco.

Televido rapide furoras tra la tuta mondo. Ŝajne ĉinoj pli ŝatas ĝin ol la aliaj popoloj. En urboj kaj vilaĝoj, ĉe vesperiĝo en multaj ĉinaj familioj oni rigardas televidajn novaĵon, kurson, plejparte amuzajn programerojn. Pri detaloj legu "Ĉinoj kaj televido".

"Familia edukado en la antikva Ĉinio" konigas ĉinajn familiajn maksimumojn, iuj eĉ estas tre rigoraj, eble tre malfacile akcepteblaj por nuntempaj homoj, tamen la ideoj montritaj de ili, kiel ekzemple, oni devas respekti la maljunulojn kaj protekti la infanojn kaj mastrumi familion ŝpareme, kaj geedzoj devas vivi harmonie, estas bonvenaj kaj fariĝis konsistiga parto de la valora tradicio de la ĉina nacio.

Turistoj en Pekino povas vidi ne nur pejzaĝojn kaj antikvaĵojn, sed ankaŭ malnovajn loĝejojn kun kvadrata korto en stratetoj. Ili povas vidi ankaŭ la nove konstruitajn domojn en plansetlejoj, kiuj multe plibonigis la loĝadon de pekianoj. Pri tio raportas la artikolo "Ŝanĝiĝo de loĝkondiĉoj en Pekino".

El Popola Ĉinio

5 [488] 1999



La hejmloko en kamerao
Fotoj de Xie Jun

Jianshui-gubernio en sud-orienta Yunnan-provinco de Ĉinio estas fama pro sia tradicia kulturo. Tie loĝas han-oj, hani-oj kaj aliaj nacioj. La naturaj pejzaĝoj kaj historiaj restaĵoj allogas allokajn vizitantojn. Kiam hani-aj gejunuloj vidas la kameraon de raportistoj, ili scivolos rigardi la hejmlokon tra la lenso.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto:


epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

ENHAŬO

- | | |
|---|--|
| <p>2 INTER NI</p> <p>4 EKONOMIE:
"Eksperimentejo" de reformado kaj pordmalfermo; Kurantaj aferoj</p> <p>6 JUNULARO:
De la Movado de 4-a de Majo al la reformado kaj malfermo</p> <p>8 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:
Studentoj kaj ilia laborserĉado</p> <p>10 EL ĈINAJ GAZETOJ</p> <p>12 En tagoj kun japanaj esperantistoj (III)</p> <p>14 Antologio Latina</p> <p>18 Agrikultura entreprenado</p> <p>20 POR KOMENCANTOJ:
Historio pri Nijnevartovsk</p> <p>21 EN ĈINAJ URBETOJ:
Urbeto de <i>tajĝičjūan</i></p> <p>24 ESP-NOVAĴOJ</p> <p>25 Familioj sur altebenajo</p> <p>28 Lia vivo estingiĝis en Lopnur</p> <p>29 VESTOJ DE ĈINAJ NACIOJ:
Baj-oj ŝatas blankon</p> | <p>32 Brilanta ĉina muziko</p> <p>35 ORIGINALE VERKITAĴJ:
Karmemore al la patrino</p> <p>36 ĈINA KULTURO:
Familia edukado en la antikva Ĉinio</p> <p>38 ORDINARAJ ĈINOJ:
Montvilaĝa instruistino</p> <p>40 Ĉinoj kaj televido</p> <p>42 Ŝanĝiĝo de loĝkondiĉoj en Pekino</p> <p>44 Reaperigo de antikvaj lignaj bovoj</p> <p>46 La Suda Katedralo en Pekino</p> <p>48 POR VIA SANO:
Ĉin-medicina kuracado de sendormeco</p> <p>51 ĈINAJ POŝTMARKOJ:
Statuoj en ŝtonkavernoj de Majimonto</p> <p>2 FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:
Reĝa kastelo kaj katedralo sur la monteto Vavel</p> <p>SUR LA DORSKOVRILO:
Kokosarbaro ĉe la Suda Ĉina Maro</p> |
|---|--|



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|----------------------|--------------------|
| 1. Shenzhen (p. 4) | 3. Guangfu (p. 21) |
| 2. Zhangzhou (p. 11) | 4. Lopnur (p. 46) |

“Eksperimentejo” de reformado kaj pordmalfermo

de SHEN ZHEN

SUR placo de Shenzhen, urbo najbara al Hongkong, staras giganta statuo, kiu etendas siajn brakojn por larĝigi la feran pordoframon. Ŝajne ĝi volus diri, ke la speciala ekonomia distrikto Shenzhen, fondita en majo de 1980, estas pioniro en la reformado kaj pordmalfermo de Ĉinio.

Kalkulo laŭ la kurzo antaŭ 19 jaroj montris, ke ekspluato de ĉiu kvadrata kilometro de Shenzhen bezonis cent milionojn da juanoj, sed la ŝtato investis nur tridek milionojn da juanoj. Do la instancoj de la loko elpensis “herezajn” rimedojn — ludoni teron. En malpli ol unu jaro sole la kvartalo Luohu akiris

kvar miliardojn da Hongkong-aj dolaroj kiel deekstera investaĵo.

De tiam la speciala distrikto Shenzhen kreis rekordojn de la lando unu post alia: Shenzhen la unua aranĝis adjudikadon en domkonstruado kaj kreis la “Shenzhen-an rapidecon” konstrui en ĉiuj tri tagoj po unu etaĝon; tie oni la unua praktikis kontraktan dungon; la unua praktikis plurprezan sistemon por merkataj varoj; la entreprenoj la unuaj dekroĉis sian produktadon kaj vendadon de la ŝtata plano... Oni povas diri, ke tiele aperis en Shenzhen la rudimento de la eksperimento de la reformado de la ekonomia strukturo de Ĉinio.

Rapide forpasis 19 jaroj kaj ĉe la sojlo de la nova jarcento, la malgranda Shenzhen kun 20 000 homoj



La stacidomo de Shenzhen

jam fariĝis moderna internacia urbo kun 4 milionoj da loĝantoj. Ĝi spertis la unuajn stadiojn de reformado kiel “prilaborado de eksteraj materialoj”, kaj en la 90-aj jaroj elmetis la temon “avangardaj industrioj”. La totala produktovaloro kreskis de 71 milionoj da juanoj en 1979 al 166 miliardoj en 1998, kio metis la urbon sur la sesan lokon en la tuta lando, kaj laŭ la kurzo de 1997, la produktovaloro kreskis je 14.5 procentoj.

En la 19 jaroj Shenzhen kreis rimarkindan profiton: en tiuj jaroj, krom la 100 miliardoj da juanoj liveritaj de la dogano, financo, fervojo, poŝto kaj

telekomuniko al la ŝtata financo, estas ankaŭ 10 miliardoj da juanoj liveritaj de la urbaj establoj al la ŝtata kaso. Malgraŭ daŭra financa krizo de Sudorienta Azio, la totala sumo de en-kaj eksporto de Shenzhen en 1998 atingis 45.276 miliardojn da usonaj dolaroj.

En la lastaj du jaroj de la 20-a jarcento kaj en la venonta jarcento Shenzhen daŭre antaŭiros en la “renovigo de la sistemo, progresigo de la industrioj kaj pliprofundigo de la reformado” kaj ludos la rolon en akcelo de prospero kaj stabileco de Hongkong. ■

KURANTAJ AFEROJ

● Nun en Pekino kuras 1.4 milionoj da aŭtoj, kies vostogaso terure poluas la aeron. En la unua tago de 1999 la registaro rigore ordonis elimini la kadukajn mikrobusojn, kaj la aŭtoj, kies vostogaso superas la permesitan normon, ne rajtas kuri en Pekino. Se la vostogaso de la kurantaj aŭtoj superos la permesitan normon en la survoja ekzameno, la numerplatoj estos forprenitaj kaj repreneblaj nur post plibonigo de ellaso de vostogaso. Tio celas nenion alian ol protekti la urbon kontraŭ poluado al la aero.

● Statistiko raportas, ke enspezo de podetala vendado de konsumaĵoj de privataj entreprenoj de Dalian, Tianjin, Ŝanhajo, Kantono kaj aliaj sume 18 grandaj apudmaraj urboj jam superis duonon de tiu de la tuta socio.

● Por sin akordigi al la laboro de sinteza kontrolo de la loĝantaro konforma al la starigo de la socia merkata ekonomio kaj la bezono de la popolo, la registaro de Ĉinio klopodos, por ke en la 2000-a jaro la loĝantaro ne superu 1.3 miliardojn, tiu en 2010-a jaro ne superu 1.4 miliardojn kaj tiu en la mezo de la venonta jarcento malkresku post kiam la nombro de la loĝantaro atingos kulminon.

● La ĉina registaro deklaris, ke ekde la 1-a de januaro de 1999 ĉiuj financaj institucioj, entreprenoj kaj individuoj de Ĉinio povos akcepti kaj uzi eŭrojn en komercado kaj financaj traktadoj kun la 11 eŭraj landoj.

● En 1998 la ŝanĝiĝo de la ekonomiaj situacioj de Ĉinio estis tre komplika, la financa krizo de Azio daŭre serioziĝis, kaj pluraj grandaj riveroj katastrofis, do kiel statis la ekonomio de Ĉinio en komparo



Kontrolo de vostogaso de aŭto, kiu veturas al Pekino

kun tiu en 1997? Respondu la jena tabelo:

	1997	1998
Produktovaloro de industrio	31752	33810 (100 milionoj da juanoj)
Produktokvanto de greno	4.92	3239.3 (100 milionoj da tunoj)
Totala sumo de en-kaj eksporto	3251	4.9 (100 milionoj da USD)
Averaĝa enspezo de urbanoj	5160	5454 (juanoj)
Averaĝa enspezo de kamparanoj	2090	2150 (juanoj)
Rapidumo de ekonomia kresko	11%	7.8%

De la Movado de 4-a de Majo al la reformado kaj malfermo


1999 ja estas jubilea jaro: la 140-a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, la 50-jara jubileo de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la 2550-jariĝo de Konfuceo... Por ĉinaj junuloj gravas ankaŭ la 80-jara jubileo de la Movado de 4-a de Majo. Por la reformado kaj malfermo, en 1998 la Ĉina Junulara Federacio kaj la redakcio de "Ĉina Junulara Ĵurnalo" kune lanĉis enketon "1978-1998: 20 jaroj en la okuloj de ĉinaj junuloj". De la Movado de 4-a de Majo al la reformado kaj malfermo, 80 jaroj da historia heredado formas la nuntempan ĉinan junularon, kiaj do ili estas? Kion ili opinias pri la ŝanĝiĝoj de Ĉinio en la lastaj 20 jaroj?

Yu Tao

SCIENCO KAJ DEMOKRATIO

La studentan movadon okazintan en la 4-a de majo 1919 ni jam konigis en la artikolo "La ĉina junulara tago" (5-a numero de EPC

"Vidu, kiu el ni estas la plej bela!"



1997). La Movado de 4-a de Majo estas komenciĝo de la ĉina novdemokratia revolucio kaj ankaŭ de la novkultura movado. La movadon lanĉis junaj studentoj kaj subtenis diversaj sociaj tavoloj. Tiel la 4-a de majo estas festotago de ĉinaj junuloj. La spirito de 4-a de Majo enhavas patriotismon, serĉon de vero k.s. Tiam la junuloj alte taksis sciencon kaj demokration, kiuj alportis novan etoson al la tiama Ĉinio, kiu suferis en la komenco de la 20-a jarcento — pro longtempa feŭdisma regado kaj fermiteco, estis multaj enlandaj koruptiĝintaj oficistoj kaj multaj eksteraj potencoj, kiuj venis ataki Ĉinion.

Tiam ĉinoj nomis sciencon "s-ro S" kaj demokration "s-ro D". En diversaj epokoj en la sekvaj 80 jaroj,

ĉinaj junuloj neniam ĉesis strebi al scienco kaj demokratio. La nunaj junuloj pli profunde komprenas siajn antaŭulojn. Tion montras la enketo organizita de la Ĉina Junulara Federacio kaj la redakcio de "Ĉina Junulara Ĵurnalo". Ĝin partoprenis 25 200 legantoj de "Ĉina Junulara Ĵurnalo". Ilia averaĝa aĝo estas 26 jaroj. Ĉ. 80% estas viroj. Oni povas diri, ke la enketo prezentas la fakton. 86% de la junuloj opinias, ke "ĉinoj pli kuraĝas esprimi sian opinion" ol antaŭ la jaro 1978 kaj "ĉinoj nun povas defendi siajn rajtojn kaj interesojn per leĝoj". Tiuj, kiuj konas la historion de Ĉinio, certe scias, ke tuj post kiam finiĝis la "kultura revolucio" okazinta antaŭ pli ol 20 jaroj en Ĉinio, ĉinoj ankoraŭ ne kuraĝis prezenti sian opinion, ĉar ilia penso estis longe subpremata. Ilia fido al demokratio kaj leĝa sistemo restariĝis nur dum la reformado kaj malfermo en la lastaj 20 jaroj.

REFORMADO KAJ MALFERMO

En 1978 komenciĝis la reformado kaj malfermo, kiu liberigas la penson kaj plibonigas la vivkondiĉojn de ĉinoj. En 1978 mi estis nur 10-jara kaj neniam vidis televidilon. Tiam mia hejmo ne



Vesto-montrado

havis fridujon nek lavmaŝinon. Mi portis veston kun flikaĵoj. Oni aĉetis grenon, oleon, viandon, ŝtofon kaj karbon per specialaj kuponoj. Oni vivis en samaj kondiĉoj. Ni spertis ĉiun ŝanĝiĝon en la lastaj 20 jaroj. La enketo montras, ke 96% de la junuloj opinias, ke ilia vivo pliboniĝis dum la reformado kaj malfermo. Nun 95% de la familioj de la enketitoj havas televidilon, 73% — lavmaŝinon, 66% — telefonon, 63% — fridujon. Iu juna kamparano skribis sur la enketilo: “En 1978 mi legis ĉe olelampo, la fulgo de keroseno nigrigis miajn naztruojn. En 1988 nia vilaĝo ekhavis elektron kaj oni ekuzis televidilon kaj lavmaŝinon.” 87% de la enketitoj sentas sin favorataj de la politiko de reformado kaj malfermo. Tiuj, kiuj spertis la pliboniĝon, tutanime subtenas la politikon.

Estas interese, ke pro pli alta postulemo pri vivkondiĉoj kaj pli multa kono pri sociaj problemoj, estas pli multe da malkontento. La enketo montras, ke 45% el la junuloj sentas, ke “multiĝas malkontentuloj”. Ne estis simila enketo antaŭ 20 jaroj. Pro fermiteco, tiaj ĉinoj ne konis la modernan eksteran mondon. Do la nuna malkontento havas du signifojn: unue, ekzistas kelkaj problemoj dum la reformado kaj malfermo; due, pro-

gresas la penso de la popolo, kiu havas pli altan postulon pri la vivo. Ili havas diversajn manierojn por montri sian malkontenton, tio ja estas evoluo de la socio.

ATENTATAJ EVENTOJ

En la lastaj 20 jaroj okazis en Ĉinio multaj eventoj. 55% el la enketitoj opinias, ke restariĝo de la ekzameno por eniri en altlernejojn estas “la plej grava evento por persona vivo”. Kaj 74% de la 31-40-jaruloj havas tian opinion. Dum la “kultura revolucio” ĉesis la nomita ekzameno, multaj junuloj ne havis ŝancon studi en altlernejo. En 1978, akcelite de Deng Xiaoping, la ekzameno estis restarigita. Multaj talentuloj estas kulturitaj, kaj la tuta socio denove alte taksas sciojn kaj respektas intelektulojn. Post finiĝo de la “kultura revolucio”, dum kiu scienco senvaloriĝis, la ĉinaj junuloj revidis “s-ron S”, kiu estis respektata dum la Movado de 4-a de Majo. Por multaj ĉinaj junuloj la enira ekzameno estas la sola vojo por ŝanĝi sian vivon. Dank’ al la ekzameno, mi venis de la plej norda provinco de Ĉinio al la ĉefurbo Pekino kaj havas eblecon labori por Esperanto en EPĈ-redakcio.

Nun la ĉinaj junuloj plej atentatas: 1. puno al koruptitoj (77% el la enketitoj atentatas tion); 2. publi-

ka sekureco (68%); 3. pozicio de Ĉinio en la mondo (67%). Tio montras, ke ĉinaj junuloj atentatas ne nur personajn aferojn, sed ankaŭ sociajn problemojn. Ili havas fortan devosenton por la socio. Same kiel junuloj en la Movado de 4-a de Majo antaŭ 80 jaroj, la nunaj estas daŭre ĉefaj akcelantoj de la socia evoluo.

PLI LIBERA, Pli LERNEMA

La ĉinaj junuloj, kiuj strebas por scienco kaj demokratio, havas pli da libereco kaj soifo pri scioj.

Malpermesi porti pantalonon kun larĝaj krurumoj, malpermesi al junaj viroj havi longan hararon kaj malpermesi diskodancon en lernejoj, tiajn aferojn mi spertis. Kaj mi enias la nunajn junajn amikojn, kiuj ĝuas pli da libereco. Pri vivo, la plej popularaj hobiaj de la nunaj junuloj estas: legado, turismo, renkontiĝo kun amikoj kaj korpoekzercado. Pri laboro, 37% de la junuloj ŝanĝis sian okupon — averaĝe 3 fojojn! 48% de ili intencas tion fari.

En serĉado de posteno kaj konkurenco en la merkato, la junuloj sentas gravecon de scioj. La enketo montras, ke krom regula edukado en lernejo, la junuloj volentas elspezi monon por lerni ion alian: 85% deziras lerni komputiladon; 67% — fremdan lingvon; 63% — aŭtokondukadon. Tio konformas al la enoficigaj reklamoj, kiuj postulas, ke la kandidatoj havu tiajn kapablojn. La junuloj deziras lerni ankaŭ juron, financon, administradon, librotenedon k.s. Ĉ. 90% el la enketitoj opinias, ke la reformado kaj malfermo alportas al ili pli da ŝancoj kaj samtempe pli streĉan konkurencon. La juna generacio estas lernema, alie ili postigos.

Retrorigardante la 80 jarojn de post la Movado de 4-a de Majo kaj la 20 jarojn de post la reformado kaj malfermo, ni trovis, ke daŭre brilas la spirito de 4-a de Majo de ĉinaj junuloj, kaj ilia patrolando konstante progresas. ■



En dungokunveno de fremdlanda entrepreno en Pekino

Studentoj kaj ilia laborserĉado

Mi volus informiĝi, ĉu estas facile por studentoj trovi okupon en via lando.

C. MARCEL (Francio)

de XIANG HONG

LA lasta duonjaro de la universitata vivo de la studentoj estas plena de esperoj kaj zorgoj. Ĉu ili povos trovi deziratan profesion post diplomiĝo? Ĉu estas glata la vojo por serĉi laboron? Kio rezultos el ilia dekelk-jara peniga studo?

STREĈA LABORSERĈADO

Je la oka matene de la 23-a de januaro 1999 s-ro Guo Jian, studento de la Lanzhou-a Universitato de Gansu-provinco, nordokcidenta Ĉinio, atingis la Pekinan Stacidomon kaj senhalte rapidis al la Ĉina Popola Revolucia Milita Muzeo, kie estis okazanta landskala dungokunveno.

Unu tagon antaŭ lia alveno al Pekino komenciĝis la vintraj ferioj de altlernejoj, kaj la dungado altiris al si sennombrajn studentojn, kia Guo Jian. Li estas studento de la fakultato de la ĉina literaturo de la Lanzhou-a Universitato kaj ĉefredaktoro de la universitata revuo. Li interpuŝiĝadis 5 horojn en la maro de homoj kaj disdonis 16 kopiojn de sia biografieto. Fine li turnis sin al "Vespera Ĵurnalo de Wenzhou" (tio ĉi estas apudmara komercovigla urbo de Zhejiang-provinco en orienta Ĉinio). Li havis agrablan interparoladon kun vicĉefredaktoro de la ĵurnalo kaj ambaŭ havis bonan impreson pri la kompanio. Ekonomikistoj opiniis, ke Wenzhou estas unu el la plej vivipovaj urboj

de Ĉinio, kaj Guo Jian decidis preni la lokon kiel deirpunkton de sia kariero.

Kompare kun Guo Jian, fraŭlino Wang Bei havis multe pli malfacilan vojon en laborserĉado. Ŝi estis diplomito de la jura fakultato de iu altlernejo de Pekino. Ŝi diris, ke ŝia laborserĉado estas korpe laciĝa kaj mense streĉa. Ni legu ŝian tagordon de unu semajno:

Lundo: telefoni al kompanio A por konfirmi daton de vid-al-vida ekzameno; posttagmeze iri al la Pekina Dua Mezgrada Juĝejo, kie ŝi antaŭe faris studentan praktikon, por informiĝi, ĉu ŝi dungos novajn laborantojn.

Mardo: interkonsiliĝi kun kompanio B pri praktikado; telefoni al

informejo 168 por demandi pri enreĝigo; pretigi du kopiojn de sia biografieto por kompanio A kaj por la onklo, kiu helpas ŝin serĉi okupon.

Merkredo: antaŭtagmeze viziti dungokunvenon; posttagmeze konsulti siajn instruistojn kaj telefoni al s-ro Zhai por demandi, ĉu lia kompanio dungos novicojn.

Ĵaŭdo: antaŭtagmeze iri denove al la Pekina Dua Mezgrada Juĝejo; posttagmeze iri al kompanio A por vid-al-vida ekzameno.

Vendredo: telefoni al kompanio C por demandi, ĉu ĝi ricevis ŝian biografieton, ĉu estas ia lumo por ŝia laborpeto; posttagmeze doni biografieton al kompanio Ĉ kaj interparoli kun la direktoro de la kompanio; renkonti iaman kunlernanton de la patro laborantan tie.

Sabato: partopreni dungokunvenon de iu fremdlanda entrepreno.

Dimanĉo: iri al la dungokunveno por novaj diplomitoj de altlernejoj.

En tia intensa kaj laciga penado ŝi pasigis kelkajn monatojn, multe spertis en laborserĉado, sed ankoraŭ ne trovis kontentigan laboron.

ĈU TRO MULTAS STUDENTOJ?

Wang Bei plendis, ke ŝi naskiĝis ne en favora tempo. En la pasintaj dekoj da jaroj la ĉinaj altlernejoj akceptis studentojn laŭ la ŝtata plano, lernigis ilin senpage kaj donis al ili laboron post ilia diplomigo. Dum tiuj jaroj la studentoj estis privilegiitaj, kaj studentigo signifis enviindan profesion en la estonteco. Diplomitoj pli fruaj ol Wang Bei neniom penis por serĉi laboron. Nun la situacio tute ŝanĝiĝis kaj en la lastaj kelkaj jaroj oni jam al kutimiĝis al la problemo, ke studentoj malfacile trovas laboron.

Ĉu tro multas studentoj? Certe ne.

Fakte Ĉinio ankoraŭ alfrontas la problemon de manko de altkleruloj. Nun en Ĉinio la diplomitoj de altlernejoj konsistigas 5 pocen-

tojn de la tutlanda loĝantaro. Tiu proporcio estas multe malpli granda ol tiu en disvolviĝintaj landoj, kies diplomitoj de altlernejoj konsistigas trionon aŭ eĉ duonon de la loĝantaro. Por disvolviĝanta lando kun 1.3 miliardoj da homoj, miliono da diplomitoj en ĉiu jaro ne estas multa. Sed la fakto malas, ke studentoj ne facile trovas laboron. Kiel oni povas ekspliki la fenomenon?

En 1977 la ĉina registaro restarigis la eniran ekzamenon por altlernejoj kaj de tiu jaro ĝis nun pli ol dek milionoj da studentoj estis diplomitaj. Tiu nombro estis preskaŭ sufiĉa por la bezono de la grandaj urboj, kaj studentoj de iuj fakoj eĉ estis superflujaj. Sed ekzistas pli seriozaj kialoj de malfacilo de la studentoj en serĉo de laboro:

Unuflanke, kune kun la profundigo de reformado en diversaj flankoj de la socio, oni ŝanĝis ekde 1997 la politikon por diplomitoj de altlernejoj, nome antaŭe la registaro donis laboron al ĉiuj studentoj, sed nun la diplomitoj devas mem serĉi laboron. Antaŭ la reformado la diplomitoj ne bezonis nek povis mem serĉi laboron, kaj ili estis enoficigitaj de la registaro, do la dungintoj kaj dungitoj ne sciis unu la alian. Krome, la antaŭa edukado ne instruis al la studentoj sin lokalizi en la socio kaj sin rekomendi. Kaj plie, la merkatiĝo de labordonado prezentis tute novan situacion al la ŝtato, la dungantoj kaj la diplomitoj.

Aliflanke, Ĉinio estas faranta strukturan reordigadon de la industria ekonomio. La reduktiĝo de la personaro de la ŝtataj organoj kaj ŝtataj entreprenoj kaj la ekonomia regreso pro la financa krizo malhelpis la socion akcepti la diplomitojn de altlernejoj.

VASTA TERENO DE LABORDONADO

Oni diris, ke en la ŝanĝiĝema situacio de la socio herooj povas plene disvolvi sian talenton. Por homoj al kutimiĝintaj al la postiĝinta

produktometodo, reformado identas al konfuzo kaj krizo; sed por la defiemaj kaj strebemaj homoj, reformado alportas ŝancon de sukceso. Laborserĉado de la diplomitoj de altlernejoj de Ĉinio kunligiĝas kun merkato de laboruloj, tio estas nepra tendenco de la evoluo de la socio. Ĝi alportas al la diplomitoj pli liberan kaj pli favoran evoluon de laborelekto, kaj al la ŝtato racionan dispozicion de kleruloj kaj liberiĝon de produkta forto. La studentoj komprenis tion kaj ne perdis fidon al la estonteco malgraŭ malfaciloj en laborserĉado. Kaj Wang Rui, kiu ankoraŭ ne trovis laboron en aprilo, diris kun plena memfido:

“Mi ne opinias, ke estas malfacile trovi laboron. Oni devas diri, ke malfacile estas trovi kontentigan laboron. Ne estas ke neniu volas dungigi min, sed ke mi volas serĉi pli bonan dunganton.”

Wang Rui estis inda je sia memfido, ĉar ŝi estis estrarano de studenta societo kaj lernis elstare. Ŝi primajstras la anglan lingvon, ŝi ricevis mezgradan ateston por komputilado kaj licencon por aŭtoveturigado. “Tiu kondiĉo estas favoraj por mia sinrekomendo,” diris Wang Rui.

Ĵus fondiĝis la merkato de labordonado por studentoj, kaj ĝi estas rudimenta rilate sistemiĝon kaj kompletiĝon. Analizante la tendencon de la merkato de labordonado por studentoj en la disvolviĝintaj landoj, oni povas diri, ke lerneja direktado al la studentoj en laborserĉado jam fariĝis tendenco de la mondo. Tial la urĝa tasko de Ĉinio estas starigi tutlandan informan reton de labordonado por diplomitoj. Kiam kompletiĝos la merkato de labordonado, ne estos malproksima la tago por studentoj ricevi kontentigan postenon. Same diris s-ro Guo Jian, kiun mi menciis en la komenco de la artikolo:

“La socio pretigos por ni pli kaj pli vastan spacon, kaj nia tasko estas hardi flugilojn kaj ekzerci nin por flugado.” ■

KION ATENTAS LA ĈINOJ EN 1999?

Laŭ specimena enketo, en 1999 la ĉinoj atent-
 as ĉefe jenajn problemojn: La 50-a datreveno de
 la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko; Repreno
 de la suvereneco de Ĉinio super Makao (Aomen);
 Ĉu la ĉina mono *Renminbi* devalutiĝos en la se-
 vera internacia ekonomia situacio? Ĉu la ĉinaj ur-
 banoj havas monon por aĉeti loĝejon, post kiam la
 ŝtato nuligis senpagan distribuon de loĝdomoj?
 Kiom devas pagi la ĉinaj urbanejoj por kuracado
 post reformado de la kuraca sistemo? Ĉu la ŝtataj
 entreprenoj, kiuj multe influas la nacian ekonomi-
 on kaj popolan vivon, venkos la malfacilojn? Ĉu
 mildiĝos la situacio pri la urbana enoficiĝo? Ĉu
 leviĝos aŭ falos la prezoj en la tempo, kiam la ŝtato
 ekscitas la enlandan bezonon? Kiom oni devas
 elspezi por lernopago de la infanoj?

La ĉina popolo atentis ankaŭ la socian medi-
 on, inkl. de la sociaj justeco kaj sekureco. Nun tio
 estas multe diskutata de la ĉinoj. Pri la socia just-
 eco oni atentis ĉefe la batalon kontraŭ koruptiĝo.
 En la pasintaj jaroj la registaro severe batalis kon-
 traŭ koruptiĝo kaj punis la malversaciulojn. An-
 kaŭ iuj altrangaj ŝtatoficistoj estis punitaj pro se-
 vera koruptiĝo.

Kaj plie, la media protekto fariĝis nova fokuso
 de la ĉina popolo. Tio montras de alia flanko, ke en
 la fino de la nuna jarcento la ĉinoj laŭ nova vid-
 punkto juĝas sian pasintecan kaj rigardas la es-
 tontecon.

FORPISIS FAMA ĈINA VERKISTINO

BING XIN

Bing Xin, honorata de la ĉinaj literaturistoj kiel
 literatura avino, naskiĝis la 5-an de oktobro 1900.
 En la pasinta jaro, kiam oni celebris la 99-an
 datrevenon de ŝia naskiĝo, ŝi diris al la gratulan-
 toj, ke ŝi kun plena memfido renkontos la jaron
 2000. Sed bedaŭrinde, nelonge post tio, ŝi forpasis
 ĉi-februare.

Bing Xin (alinome Xie Wanying) naskiĝis en
 Fujian-provinco. 12-jara, ŝi veturis al Pekino kune
 kun siaj gepatroj. Ŝi studis en Yanjing-universita-
 to (nun la Pekina Universitato) kaj post diplomigo
 veturis al Usono en 1923 por daŭrigi sian studon.
 Post 3 jaroj ŝi magistriĝis pri literaturo.

Ŝi komencis publikigi literaturajn verkojn en
 1922. Ŝiaj ĉefaj verkoj estas kolektitaj prozaĵoj
 “Al Malgrandaj Legantoj”, poemaroj “Steloj”,
 “Printempa Rivero” k.a. Ŝi edifis infanojn de plu-
 raj generacioj per siaj verkoj plenaj de belaj sen-
 toj.

“Kompletaj Verkoj de Bing Xin” kun 4 mili-



Bing Xin

onoj da ideogramoj jam eldoniĝis. Ŝi donacis 90
 mil juanojn el sia honorario al la Fonduso por Edu-
 ka Afero de Ĉinaj Kampaninoj. Ŝi opiniis, ke la
 sorto de la ĉinaj kampaninoj decidas la fizionomion
 de la ĉina kamparo.

Bone diris Bing Xin al siaj legantoj: “Amo sig-
 nifas ĉion.”

ĜARDENOJ SUDE DE YANGZI-RIVERO

La ĉinaj ĝardenoj havas du specojn: imperi-
 estraj kaj popolaj. En Pekino troviĝas multaj im-
 periestraj ĝardenoj kaj en Suzhou, Wuxi, Nankino
 kaj aliaj lokoj sude de Yangzi-rivero la ĝardenoj
 plejparte estas popolaj.

“Ponteto super lageto” estas unu el la karak-
 terizaj vidaĵoj en la ĝardenoj sude de Yangzi-ri-
 vero. La pontoj el ŝtono estas plataj, zigzagaj aŭ
 arkaj. Ĝenerale, la lagoj en la ĝardenoj estas ne-
 grandaj, tamen bone aranĝitaj, ke ili impresas pli
 vaste. En iuj el ili kuŝas insuletoj interligitaj per
 pontetoj.

En la ĝardenoj ĉie vidiĝas kuriozaj rokoj, kiuj
 formas artefaritajn montetojn aŭ aliajn pejzaĝojn.

Preskaŭ en ĉiuj ĝardenoj sude de Yangzi-ri-
 vero estas koridoroj, kiuj ludas la rolon dividi la
 spacon, interligi kaj profundigi la pejzaĝojn. La
 koridoroj troviĝas ĉe akvo, sur montodeklivoj aŭ
 inter floroj. Ekster la koridoroj kreskas salikoj kaj
 bambuoj. Estas ankaŭ du-etaĝaj koridoroj. La
 koridoroj kondukas la vizitantojn al belaj lokoj.
 La koridoroj kun benkoj estas ankaŭ ripozejo por
 turistoj.

En la ĝardenoj belas ankaŭ diversaj fenestroj
 — kvadrataj, rondaj, sesangulaj, okangulaj kaj fo-
 lioformaj. En Liuyuan-ĝardeno de Suzhou estas
 pli ol 30-formaj fenestroj en la 700-metra kori-
 dor. Tra la fenestroj oni povas ĝui la eksterajn

pejzaĝojn.

Ankaŭ la blanke kalkitaj muroj de la tieaj ĝardenoj estas rigardindaj. Ili aŭ kaŝiĝas en verda arbaro aŭ staras ĉe laĝetoj kaj artefaritaj montetoj. La neĝblankaj muroj, nigraj tegmentoj, brunaj pordoj kaj fenestroj sur la fono de verdaj bambuoj estas aparte belaj kaj speguliĝas en la klara akvo.

NARCISO


Ĉiujare en la Printempa Festo narciso pompas en multaj hejmoj. Ĝiaj blankaj petaloj kaj flavaj stamenoj faras la domon kvieta.

Legendo diras, ke narciso estas transformita el akva feino, kapabla subigi perverson kaj forigi malpurecon. Ĝenerale, enakviĝinte por 30 tagoj, ĝi pompe disfloras. Tial oni metas ĝin en porcelanan vazon 30 tagojn antaŭ la Printempa Festo. Al la vazo kun akvo oni ankaŭ aldonas kelke da rulŝtonoj kaj poste metas la vazon en salonon, dormejon aŭ kuirejon.

La elmigrintaj ĉinoj havas apartan amon al narciso. Ĉiufoje, kiam ili ricevas narcisobulbon el Ĉinio, ili atenteme purigas ĝin, ensakigas ĝin kaj kultas ĝin en la niĉo kun kulta tabulo de la prapatroj.

Narciso apartenas al bulboherboj. Antaŭ mil jaroj ĝi kreskis en la lokoj sude de Yangzi-rivero, kie estis varmete kaj humide. Poste, pro ŝanĝiĝo de la grundaj, akvaj kaj klimataj kondiĉoj ĝiaj produktoj pli kaj pli reduktiĝis kaj nun ĝia plej bona vario estas kulturata en Zhangzhou, Fujian-provinco.

Oni kulturas narcison tiamaniere: forigi ĝiajn eksterajn bulberojn kaj malnovajn radikojn kaj meti ĝin vertikale en vazon kun akvo. Oni ankaŭ povas



Narciso

skulpti la bulbon, por ke la floroj estu pli variaj kaj pompaj.

Elekti konvenan bulbon estas unua paŝo por la floranĝo. Oni ofte elektas taŭgan por skulpti ĝin en formon de tekruĉo, birdo, florkorbo, persiko, pruno, krabo, koko aŭ elefanto, kaj difini la tempon de ĝia florado estas eminenta arto de la Zhangzhou-aj florkulturistoj.

Popola ludilo — tera turbo

Diabolo devenis de tera turbo, alinome tera akso, farita el bambua tubo, kies aperturoj estas blokitaj per lignaj platoj, kun malgrandaj truoj ĉe la randoj kaj maldika akso meze. Por ludi ĝin, oni devas pretigi alian lignan platon kun trueto ĉe la fino, tra kiu oni volvas fadenon ĉirkaŭ la akso de la turbo, poste oni starigas la turbon pere de la plato

kaj forte tiras la fadenon, por ke la turbo sin liberigu de la fadeno kaj turniĝu surtere. Vento venas tra la truoj, kaj la turbo sonoras.

Antaŭe knaboj ŝatis ludi teran turbon kun du radoj, ĉar ĝia sonorado estis pli agrabla. Nuntempe oni povas trovi ĝin ĉe etvendisto dum la popolaj festoj, tamen tre hazarde.

En tagoj kun japanaj esperantistoj (III)

de WANG HANPING


EN la frua mateno de la 13-a de oktobro 1998 mi kaj s-ino Morita Yoko veturis de la Esperanto-Domo en Yatugatake al Tokio. En la stacidomo Ŝinjuku en Tokio nin akceptis geedzoj Takizawa. Jam en la E-Domo mi konatiĝis kun s-ro Takizawa, emerita fotisto. Profitante de la tagmeza paŭzo, ili kondukis min al la magazeno Takaŝima. Jen mia ununura pasumado dum miaj kvar tagoj en Tokio. Min estis atendantanta la stafetkurado de Esperanto.

KONTRIBUINTO DE AMIKA INTERŜANĜO INTER LA POPOLOJ JAPANA KAJ ĈINA

La Japana E-instituto (JEI) sidas en 4-etaĝa domo en Ŝinjuku, Tokio. Tuj post kiam mi venis en la domon, min kaptis la streĉa labor-atmosfero de japanaj samideanoj. S-ro Kitagawa interŝanĝis kun mi kelkajn vortojn sen interrompi sian redaktan laboron. Ankaŭ s-ino Doi Ĉieko, kiu multe helpis min por mia vojaĝo en Japanio, estis tre okupita. Akompanate de s-ro Isino Yosio, sekretario de JEI, mi vizitis la E-bibliotekon de la instituto. Kaj mia ĉefa tasko de la tago estis intervjui s-ron Kurisu Kei, prezidanton de la Societo por Japana-Ĉina Korespondado, kaj aŭskulti de li la 20-jaran

pasintaĵon de la societo.

Jam en la 30-40-aj jaroj s-ro Kurisu Kei havis multajn korespondajn amikojn el pluraj landoj, inter kiuj estis pioniroj de la ĉina E-movado Ĵelezo kaj Honfan. Li ankaŭ kompilis libron el leteroj titolitan per "La sama suno lumigas la mondon". Poste li perdis informojn pri la ĉinaj E-amikoj. Nur en la jaro 1978, post kiam li legis en EPĈ la rubrikon "Korespondi Deziras" refunk-



S-ro Kurisu Kei

S-ino Kitagawa Ikuko (la kvara de maldekstre) kaj ŝiaj E-kursanoj



ciintan, li kredis, ke samideanoj de la du landoj povas reciproki leterojn. Do, li kuraĝe alvokis en ĵurnaloj kaj kune kun aliaj fondis en 1979 la Societon por Japana-Ĉina Korespondado. Nuntempe la societo havas 8 filiojn en diversaj lokoj de Japanio kaj 400 japanajn membrojn, kiuj ĉiuj korespondas kun pluraj ĉinaj e-istoj. S-ro Kurisu Kei opinias, ke ofta korespondado povas akceli interkomprenon inter la du popoloj kaj profundigi ilian amikecon. Krom sia organo "Amiko", la societo eldonas ankaŭ librojn el leteroj kaj okazigas diversajn aktivadojn.

La 88-jara s-ro Kurisu Kei neniam ĉesis skribi por la amika interŝanĝo inter la du popoloj. En 1995 li gajnis premion en la belarta konkurso de UEA kaj samtempe konatiĝis kun s-ro Mao Zifu, alia premiito de la konkurso. Ekde tiam li havas plian E-amikon el Ĉinio kaj multe helpas kaj kuraĝigas lin. Nuntempe li estas kolektanta materialojn pri Verda Majo por verki pli detalan biografion pri ŝi.

SUGINAMI E-RONDO KAJ E-KURSO EN LA SUPERLERNEJO NI'PA

Dum la unuaj 2 tagoj en Tokio mi loĝis ĉe s-ro Shirai Yasuo, kiu plurfoje akceptis ĉinajn e-istojn hejme. S-ro Shirai Yasuo kaj lia filo iam vizitis Ĉinion, akompanante s-ron Tokuda Rokuro. En Suginami, kie loĝas s-ro Shirai Yasuo, fondiĝis antaŭ 20 jaroj la E-rondo kaj viglas la E-movado. Menciindas ke s-ino Morita Yoko, geedzoj Takizawa kaj s-roj Inumaru Fumio kaj Shirai Yasuo estas aktivaj en la E-rondo, parto de kies membroj kaj mi gaje renkontiĝis en la sama vespero de mia alveno al Tokio.

Ĉio iris laŭ la plano. La 14-an de oktobro mi vizitis Toyo-universitaton kaj la 15-an — E-kurson de la superlernejo Ni'pa en Kanagawa. Tio ebligis al mi multe sperti Esperanton en tre mallonga tempo.

Aprile de 1998 la superlernejo Ni'pa starigis E-kurson, kiun gvidas s-ino Kitagawa Ikuko. Diplomiĝinte el universitato, ŝi eklaboris kiel angla-lingva instruistino en mezlernejo kaj samtempe gvidis E-klubon. En 1997, post kiam ŝi eklaboris en la superlernejo Ni'pa, ŝi tuj klopodis por instrui Esperanton kiel unu el la nedevigaj lerno-objektoj por triaklasaj lernantoj. Funkciigi E-kurson estis la unua fojo por japanaj mezlernejoj, en kiuj oni instruas nur la anglan kiel devigan fremdan lingvon. Tio sendube vekis grandan atenton ĉe instruistoj kaj lernantoj. Ekster ŝia atendo, 36 lernantoj ĉeestis la E-kurson, kiu daŭras du horojn ĉiusemajne. Pri tio plurfoje raportis la lokaj ĵurnaloj. La 17-18-jaraj lernantoj multe interesiĝis pri tiu facile lernebla lingvo. Kun espero pli vaste koni la eksteran mondon pere de Esperanto, iuj el ili ekkorespondis kun samaĝuloj de aliaj landoj.

S-RO MATUMOTO KEN'ITI

La preskaŭ 90-jara s-ro Matumoto Ken'iti estas fidela leganto kaj amiko de EPĈ. Malgraŭ sia oldeco, li ĉiujare partoprenis UK kaj plurfoje vizitis la redakcion de EPĈ, donante al ĝi grandajn subtenojn kaj helpon. Informiĝinte, ke mi venos al Japanio, li tuj kontaktiĝis kun s-ro Nagase. Li esperis, ke mi gastos ĉe li kaj vizitos la iaman loĝejon de Guo Moruo, fama moderna ĉina literaturisto kaj simpatianto de Esperanto.

Posttagmeze de la 15-a, s-ro Matumoto Ken'iti veturis de sia loĝejo en Iĉikawa al la sidejo de JEI por aŭskulti vespere mian prelegon pri la ĉina E-movado. Sendube, la informoj pri la nuna E-agado de la najbara lando estis utilaj. Post finiĝo de mia prelego je la 21-a, s-ro Matumoto Ken'iti kondukis min al sia loĝejo.

En la sekvanta antaŭtagmezo, akompanate de iu oficisto de la Kultura kaj Eduka Komitato de la urbo, ni vizitis la iaman loĝejon de Guo Moruo kaj la ĝardenon proksime de ĝi. Tie staras poem-steleo de Guo Moruo kaj paca-amikeca monumento starigita por memori la 15-jariĝon de ĝemeliĝo de la urboj Iĉikawa kaj Leshan, naskiĝloko de Guo Moruo. Poste s-ro Matumoto Ken'iti gvidis min viziti sekcion pri internacia interŝanĝo de la urba registaro kaj mi donacis al ĝi "Qu Yuan", dramon en Esperanto verkitan de Guo Moruo. Profitante de tiu okazo, s-ro Matumoto Ken'iti propagandis Esperanton.



S-ro Matumoto Ken'iti (maldekstre) antaŭ la paca-amikeca monumento por ĝemeliĝo de la urboj Iĉikawa kaj Leshan

Antaŭe s-ro Matumoto Ken'iti laboris en banko. Longtempe li respondecis pri financo de JEI. Li ĉiam donas atenton al disvolviĝo de la E-movado kaj laŭeble agas por ĝi. Estas li, kiu laboris pri la japana lingvo por "Internacia Komerca-ekonomika Vortaro en 11 Lingvoj" eldonita de la Ĉina E-Eldonejo en 1990. Nun ĉiutage li tradukas "Analektoj de Konfuceo" el Esperanto en la japanan lingvon per komputilo. ■

Antologio Latina

de GERRIT BERVELING (Nederlando)

Antaŭ nelonge aperis ĉe Fonto (Brazilo) la unuaj 2 volumoj de mia Antologio Latina. La unua volumo donas skizan prezentadon pri la frua romia historio kaj liveras bildon pri la unua periodo de la latina literaturo.

En la Antologio mi klopodas por liveri fidindan impreson pri la tiuepoka latina literaturo, sed ne nur tion: mi komencas per historia kadro ĝenerala, poste mi donas ĉe la tradukoj multajn klarigajn piednotojn pri historiaj, sociaj kaj religiaj apartaĵoj.

Kaj volumo 3, kiu atingas ĝis la jaro 200 p.K., estas komputile preskaŭ preta. Pri postaj volumoj tute sensisteme mi de jaroj jam ekverkis. La tuto eble povos fariĝi 10-voluma.

Por doni certan impreson, jen el volumo 3 la enkondukon kaj tekston el tiu volumo. Post tio sekvas eta fragmento el la unua latina romano.

Enkonduko

Fedro (Phaedrus) verkis kvin librojn da fabloj. Li naskiĝis en Tracio, inter 15 a.K. kaj la jaro “nul”. Laŭ la aserto en la plimultaj manuskriptoj, li estis liberigito de Aŭgusto. Do komence li estis sklavo. En sia junaĝo supozeble li ricevis bonan trejniĝon, ĉar en liaj versoj oni malkovris citaĵojn aŭ duoncitaĵojn el Enio, Pakuvio, Lukrecio, Katulo, Vergilio, Horacio, Ovidio, Publilio Siro. Li devas esti mortinta ĉirkaŭ 55-65 p.K.

Estas tre strange kaj fakte ne jam klarigite, ke en sia “Konsolo al Polibio” (8.3) Seneko ja parolas pri fabloj, sed nur menciante la grekan Ezopon — Seneko eĉ asertas ke tiun ĉi ĝenron en la latina oni ankoraŭ ne elprovis! Ĉu tio implicas, ke Seneko ne konis Fedron? Aŭ ĉu intence li prisilentas lin? Aŭ ĉu la plebano Fedro por la aristokrata Seneko ne estis sufiĉe serioza por mencii?? — Alia eblo estas, ke Fedro publikigis nur post 43 p.K., la dato de la menciita “Konsolo”.

Aviano parolas pri kvin libroj. Fakte tiuj ja konserviĝis, sed minimume la libroj 2 kun nur 8,

kaj 5 kun nur 10 fabloj origine devas esti estintaj pli ampleksaj. Do nepre perdiĝis parto el la verkoj de Fedro. Tamen tiuj, kiuj postrestas, kvankam forme kaj stile ege simplaj, havis grandegan influon.

Kiel sian grandan ekzemplon plurfoje Fedro mencias la grekon Ezopo. Sed fakuloj konvinke sciis pruvi, ke estas krom tio pluraj aliaj fontoj, kiujn li utiligis.

Supozeble la plej fama aŭtoro de — forme ege rafinitaj — fabloj estas la franco Jean de la Fontaine. En Esperanto, krome, estas fama la rusa fablisto Krilov. Kaj fakte, ĉar ni ja menciis pri Esperanto: nialingve la ĝenro fablo jam tre frue trovis sian kultivanton: jam en 1891 aperis “50 elektitaj fabloj de Ezopo” (tradukis Iv. Lojko). En 1932 rerakontis tiajn fablojn Ossaka Kenĵi (“Fabloj laŭ Ezopo”). Ankaŭ alia japano, Nakagaki Kojiro, en 1954 aperigis parencan tradukaĵon: “50 fabloj de Ezopo”, kaj en 1955 sekvis vere brila reverkaĵo, ne tiom traduko, de Kálmán Kalocsay: “Ezopa Saĝo”.

Teksto: Vidvino kaj soldato

*Virino perdis l' edzon, kiun amis ŝi
dum pluraj jaroj, kaj ŝi entombigis lin.
Ĉar forŝiriĝi de l' mortint' ne povis ŝi
kaj en lament' ŝi vivis en la tombkavern',
ŝi baldaŭ famis kvazaŭ ĉasta virgulin'.
Samtempe do rabistoj de la Jova templ'
apude krucumiĝis: estis justa pun'.
Por ke ne malaperu ilia restaĵ',
kadavrojn jen ekgardis vigla do taĉment',
apud la tombo, kien sin enŝlosis ŝi.
Sofia foje, unu el la gardistar'
meznokte petis akvon de la servistin',
kiu hazarde ĵus priservis al mastrin'
irona dormi; ĉar ĝis en profunda nokt'
la longan vigladon plilongigis ŝi.
Tra fendon de l' aperta pordo la soldat'
rimarkis l' elĉerpitan: belas ho vizaĝ'!
Ekflamis lia koro tuj en fajra am'
kaj brulis ĉiam pli malĉasta ĉi dezir'.
Lia spirita lerto trovis kaŭzojn mil
por oftaj renkontiĝoj kun vidvino ĉi.
Iom post iom kaptis ŝin la kutimiĝ'
kaj la fremdulon ĉiam pli ekŝatis ŝi;
per lig' pli forta baldaŭ ili ligis sin.
La noktojn diligente pasas la gardist',
sed mankas jen subite korp' de unu kruc'!
Panike al la in' klarigas ĝin soldat'.
Sed diras sanktulino ĉi: "Ne timu vi",
kadavron edzan ŝi pendigas je la kruc',
por ke li ne puniĝu pro la neglektem'.
Hontindo tiel prenas lokon de la virt'.*

Por komparo do jen la aludita ĉapitro de Gajo Petronio Arbitro, el lia romano Satirikono:

Fragmento el la unua latina romano: la matrono de Efezo

Certa matrono en Efezo estis tiel fama pro sia ĉasto, ke eĉ el najbaraj gentoj ŝi logis la virinojn al si por spekti ŝin.

Kiam sian edzon ŝi entombigis, ne kontenta per la vulgara kutimo, sekvi la funebran procesion kun malligitaj haroj kaj vee frapadi la nudan bruston antaŭ la okuloj de l' tuta ĉeestantaro, ŝi eĉ sekvis la mortinton en la tombon mem kaj komencis prigardi kaj priplori lin tie tage kaj nokte, post kiam lia korpo estis metita en grekstilan hipogeon.

El ŝia afliktiĝo kaj el ŝia intencita malsatmortado ne povos delogi ŝin la gepatroj, nek la parencoj; la magistratanoj finfine sensukcese foriris, kaj la senekzempla virino, kiun ĉiuj kompatis, jam pasigis la kvinan tagon sen iu ajn manĝaĵo.

Ĉe la kompatinda sidis unu plej fidela servistino, ŝi akordigis siajn larmojn al tiuj de la funebrantino kaj ĉiufoje, kiam la lampo, kiu staris en

la tombo, ekmalfunkciis, ŝi renovigis ĝin.

En la tuta urbo do estis nur unu sola temo: nur tio brilis kiel vera ekzemplo de pudoro kaj amo, konsentis ĉiuj homoj.

Samtempe la imperatoro de la provinco krucumigis kelkajn rabistojn en la proksimeco de la ejo, en kiu la matrono priploris la ĵusan mortinton. Sekvanokte do la soldato, kiu prigardis la krucojn, por ke neniu deprenu la kadavrojn por enterigo, rimarkis, ke inter la tombomonumentoj brilas iom hela lumo, kaj li perceptis ĝemadon; pro homa malforto li deziris sciiĝi, kiu aŭ kio tion kaŭzas. Tial li descendis en la kaŝejon kaj kiam li rimarkis la belegan virinon, li rigidiĝis, kvazaŭ trafite de monstro aŭ inferaj aperaĵoj. Poste, kiam li rimarkis la kuŝantan kadavron kaj konsideris la larmojn kaj la unge fositan vizaĝon, prave komprenante kio estas, ke la virino ne povas elteni la mankon de l' mortinto, li portis sian modestan manĝeton en la ejon kaj ekprovis konvinki la funebrantinon, ke ŝi ne obstinu en sensenca ĉagreno, ke ŝi ne disŝiru sian bruston sub ĝemado, kiu ja neniom utilos: ĉies fino estas ja identa kaj ĉies finfina restadejo, ktp, per kio la lezitajn animojn oni rekondukas al sano.

Sed ŝi, kvankam tuŝita de la konsolo de l' nekono, ankoraŭ pli forte ŝiris al si la bruston kaj tiris la harojn, kiujn ŝi kuŝigis sur la kuŝantan kadavron.

Sed la soldato ne delasis, sed admonis la virinon per ĉiam la samaj argumentoj tamen akcepti iom manĝi, ĝis fine la servistino, sendube logite de la vinaodoro, kiel unua sin donis venkita kaj etendis la manon por akcepti la malavaran donacon, kiun li prezentis al ŝi. Post tio, fortigita de trinko kaj manĝo, ŝi ekatakis la persistemon de l' mastrino kaj diris: "Kiom utilas elĉerpi vin per fastado, viva enterigi vin, senkulpe sendi vian animon en la morton antaŭ ol venis via tempo?"

Ĉu la Manesoj, ĉu cindro entomba tion rimarkos?

Ĉu vi volas returniĝi en la vivon? Forskuu do vian inan malforton kaj ĝuu la taglumon, ĝis tio ankoraŭ estos ebla! Jen tiu kadavro tie kuŝanta mem admonas vin, por ke vi vivu!"

Neniu povas fermi la orelojn kontraŭ insista invito preni manĝon kaj vivi. Tial la virino, kiu malsatis pro abstino kelktaga, lasis sin konvinki, kaj ne malpli avide ŝi satigis sin per la nutraĵo ol la servistino, kiu unua estis konvinkita. Vi ja scias, kio kutime delogas la homojn kun satigita stomako. Per la samaj ĉarmaj argumentoj, per kiuj la soldato atingis, ke la matrono deziru vivi, li nun atakis ŝian ĉaston. Kaj vere li ŝajnis al la ĉastulino

ne malbela nek sensprita junulo, kaj ankaŭ la servistino provis favorigi ŝin pri li kaj foje citis:

Ĉu eĉ al plaĉa am' vi rezistas?

Ĉu vi neniam pripensas, kies landon vi loĝas?

Kial mi tardus? Ankaŭ tiu korp parto ne plu vivis en abstino, kaj nia soldato ambaŭfronte venke persvadis. Ili do kunkuŝis ne nur tiun nokton, en kiu ili faris sian nupton, sed ankaŭ la sekvan kaj la trian, kompreneble bone ŝlosinte la pordon de l' tobo, por ke se iu konato aŭ nekonato hazarde alproksimiĝus al la monumento, li kreu ke la ĉastega virino mortis super la kadavro de sia edzo.

La soldato, kiun delectis la belo de l' virino kaj la sekreteco, ĉiutage aĉetis ĉiujn bonaĵojn kiujn permesis liaj rimedoj, kaj tuj post noktiĝo li ilin portis en la tombomonumenton. Tiel okazis, ke parencoj de unu el la krucumitoj, kiam ili rimarkis ke la gardostaro ne plu tiel severas, dum-

nokte dekrucigis la pendigiton kaj prizorgis liajn lastajn honorojn. Sed la soldato, trompita dum li malzorgis sian taskon, kiam la postan tagon li vidis unu krucon senkadavra, timante punegon, klarigis al la virino, kio okazis: li ne atendos la verdikton de l' juĝisto, sed propraglave kondamnos sian malzorgemon. Do ŝi ordigu lokon por lia kadavro kaj uzu la tombon ne nur por sia edzo, sed ankaŭ por la amato. Sed la virino, ne malpli molkora ol ĉasta, diris: "Ke tion malpermesu la Dioj, ke en sama tempo mi perdos du amatajn virojn. Prefere la mortinton mi igu utila, ol ke mi mortigus la vivanton."

Konforme al tiuj vortoj, ŝi ordonis levi la kadavron de sia edzo el la kesto kaj fiksi al tiu kruco, kiu estis malplena. La soldato obeis la prudentan ideon de ĉi virino, kaj la sekvan tagon la popolo miris, kiel do la mortinto suriris la krucon... ■

Esperanto-aranĝoj

(de majo ĝis aŭgusto 1999)

Laŭ "Plena Kalendaro de Esperanto-Aranĝoj" de la redakcio de Eventoj, ni enlistigas 30 el ili, por ke vi trovu taŭgan kunvenon. La ceteraj aperos en venontaj numeroj.

La Red.

08-15.majo

Internacia Kongreso de la Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEFF), Le Mans, Francio. Inf: Jean Ripoche, 6 rue des Platanes, La Gautrie, FR-72230 Arnage, Francio. Tel/fakso: +33-243.211639. Rete: <Jean.Ripoche@wanadoo.fr>

21-23.majo

SATEB Konferenca Semajnfino kaj Jarkunveno, Barlaston. Inf: Derel Tatton, Wedgwood Memorial College, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST 12 9DG, Britio. Tel: +44-1782-372105. Rete: <college@staffordshire.gov.uk>

27-31.majo

Latvia Internacia Printempo (LIP), Riga-Priekuli-Gaujiena-Riga. Inf: Mara Timermane, K. Valdemara 145/1-32, LV-1013 Riga, Latvio. Tel: +371-7361395

28-30.majo

94-a Skota Kongreso de Esperanto, Orkney. Inf: Irene Bennett, Rossignol, Glaitnes Road, St. Ola, Kirkwall, Orkney KW15 1TW, Britio. Tel: +44-1856-875033

04-05.junio

2-a Rendevuo pri Esperanto kiel Laborlingvo aŭ Kampo de la Sano, Ribeirao Preto. Inf: Instituto Homeopico Francois Lamasson, Rua Americo Brasiliense, 1418 cep BR-14015-150 Ribeirao Preto, Brazilio. Tel: +55-16-6368889. Rete: <lamasson@netsite.com.br>

24-27.junio

3-a Danuba Esperantlingva Scienca kaj Kultura Forumo, Poprad. Inf: Esperanto-Regiona Societo, Sobotsk nam. 36, SK-05801 Poprad, Slovakio. Tel/fakso: +421-92-32419

01-08.julio

Somera Esperanto-Feriado, Burgas. Inf: Esper-

inform. p/a B. Leonov, p.k. 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario.

04-13.julio

39-a tendaro OKSEJT, Tihvin. Inf: Andrej Ananjin, ab. ja. 31, RU-117071 Moskvo, Rusio. Rete: <ananjin@usa.net>

04-18.julio

Somera Esperanto-Lernejo (SEL '99), Poprad. Inf: Esperanto-Regiona Societo, Sobotsk nam. 36, SK-05801 Poprad, Slovakio. Tel/fakso: +421-92-32419

05-10.julio

35-a Brazila E-Kongreso, Campo Grande. Inf: Societo de Esperanto Mato Grosso do Sul, Rua 15 de Nov. 230/55, C.P.3530, BR-79002-140 Campo Grande - MS, Brazilio

17-21.julio

Hispana Kongreso, Castellon. Inf: Kongresa Sekretario, Av. Burjasot 29, A-31, ES-46009 Valencia, Hispanio. Tel: 34-964-203238. Rete: <a-casquero@redestb.es>

17-23.julio

Internacia Esperanto-Konferenco MCMXCIX de OSIEK en Metz: Mono kaj Civilizo. Inf-rete: <ericl@iname.com.fr>

21-25.julio

9-a Eŭropa Esperanto-Forumo, Castell-Valencia. Inf: Augusto Casquero, av. Burjasot 29 A-31., ES-46009 Valencia, Hispanio. Tel: +34-96-3401369.

24-31.julio

SAT-Kongreso en Karlovy Vary. Inf: KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice, Ĉeĥio. Tel: +420-2-9912201. Rete: <chrdle@telecom.cz>

25-31.julio

65-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, Berlin. Inf: Theodor Speckmann, Trierer Str. 45, DE-50674 Köln, Germanio.

31.jul.-07.aŭg.

84-a Universala Kongreso de Esperanto, Berlin. Inf: LKK, d-ro Bengt-Arne Wickström, Weseler Str. 17, DE-10318 Berlin. Rete: <UK99.Berlin@wiwi.hu-berlin.de>

01-06.aŭgusto

12-a Mondkongreso de Aplika Lingvistiko (IALA '99), Tokio. Inf-rete: <usuih@sipeb.aoyama.ac.jp>

02-08.aŭgusto

Somera Esperanto-Tendaro Intermondo-2, Volgograd. Inf: Eduard Kolosov. Rete: <edik@esperanto.nu>

07-13.aŭgusto

33-a ILEI-Konferenco, Karlovy Vary, Ĉeĥio. Inf: Bertil Andréasson, Södra Rörum pl.455, SE-242 94 Hörby, Svedio.

07-14.aŭgusto

14-a Ekumena Kongreso en Gliwice. Inf: Stanislaw Mandrak. Rete: <staman@priv.onet.pl>, <bernhard.eichkorn@esperanto.de>

07-14.aŭgusto

3-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro (JET'99) en Gliwice. Inf: Stanislaw Mandrak. Rete: <staman@priv.onet.pl>, <bernhard.eichkorn@esperanto.de>

07-14.aŭgusto

9-a Internacia Esperanto-Kongreso, Torun. Inf: Monda Turismo, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. Tel/fakso: +48-52-3415744 aŭ 3460082. Rete: <andreo@rubikon.net.pl>

09.aŭgusto

11-a Ĝenerala Kunveno de Monda Turismo, Bydgoszcz, Pollando. Tel/fakso: +48-52-3415744 aŭ 3460082. Rete: <andreo@rubikon.net.pl>

09-16.aŭgusto

55-a Internacia Junulara Kongreso, Zánka. LKK de 55-a IJK, Pf. 87, HU-1675 Budapest, Hungario. Tel: +36-88-424339, fakso: +36-1-2828885. Rete: <hej@math.bme.hu>

09-16.aŭgusto

Hungaria Esperantista Semajno, Balatono. Inf: Vojaĝoficejo Espertur, Tátra u. 4, HU-1136 Budapest, Hungario. Tel. +36-1-2680306, fakso: +36-1-2680331. Rete: <esperantohea@mail.c3.hu>

14-21.aŭgusto

Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, Pollando. Inf: Christoph Knabe, Dortmundstr. 9A, DE-10555 Berlin, Germanio. Tel/fakso: +49-30-3913978. Tel: +49-30-391356. Rete: <knabe@tfh-berlin.de>

15-21.aŭgusto

Kultura kaj festa semajno, Budapest. Inf: Movilo, Soroksi 117D, HU-1095 Budapest, Hungario. Tel: +36-1-3782793

17-21.aŭgusto


Multlingva staĝo: iniciado al diversaj naciaj lingvoj pere de Esperanto, Bouresse. Inf: Kvinpetalo, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel/fakso: +33-549-428047

21-26.aŭgusto

68-a Itala Kongreso de Esperanto, Riva del Garda (Trento). Inf: 68-a IKE, Segreteria Palacongressi, Parco Lido, IT-38066 Riva del Garda (TN), Italio. Tel: +39-0464-520000. Fakso: +39-0464-555255

29.aŭg. - 03.sept.

21-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS-21), Rimini kaj San-Marino. Inf: Akademio de la Sciencoj, Kleinenberger Weg 16b, DE-33100 Paderborn, Germanio.



En laborejo de vinfarejo

Agrikultura entreprenado

Teksto kaj fotoj de HAN HONG


Panxi, kiu sidas en Sichuan-provinco, sudokcidenta Ĉinio, abundas je kampoj kaj akvo. Ĝi havas subtropikan klimaton, kvazaŭ ĝi es-

tus natura forcejo.

Antaŭe ĝiaj kamparanoj vivis malriĉe. Por bonigi ilian vivon, en 1994 la ĉina registaro, per kredito el la Monda Banko kaj avangarda alilanda tekniko, starigis agrikulturan disvolvan regionon en Panxi. Post

proksimume 5 jaroj konstruiĝis la sukerkana, frukta kaj sekafrukta produktoj, kie la kamparanoj povas fari laŭkontraktan entreprenadon. La agrikultura ekonomio stabile progresis, ke ili iom post iom forpulis la malriĉon.

En la hejmo de kamparanoj



Reveno de paŝtado





En kultivejo de mangoj



En florkultiva forcejo



Rikolto de vinberoj



Historio pri Nižnevartovsk

EN 1909 sur bordo de la rivero Obo en la norda parto de Toboljska regiono de Siberio aperis 3 familioj. Ili konstruis malgrandajn loĝejojn en arbaro kun multaj birdoj kaj bestoj kaj vivtenis sin per fiŝkaptado. La urbo Nižnevartovsk evoluis ja el tiu trifamilia vilaĝo.

Dum la periodo de 1911 ĝis 1918 al tiu vilaĝo aliĝis ankorau dekoj da novaj malsamnaciaj familioj. Krom kapti fiŝojn kaj ĉasi bestojn, ili ankaŭ rikoltis agrikulturaĵojn, produktadis el arboj lignon kaj vendadis malgrandegajn lignajn pecojn al preternavigantaj vaporŝipoj. Poste ili ŝanĝis tion kontraŭ pano, sukero kaj vestoj en specialaj kooperativaj vendejoj. Estis ankaŭ konstruitaj lernejo, medicinejo kaj biblioteko.

Fine de junio 1941 paca vivo

de la vilaĝanoj estis rompita. Ili eksciis pri la milito kontraŭ la faŝisma Germanio. Ĉiuj sanaj viroj kaj virinoj forlasis la vilaĝon. Ili forveturis per ŝipoj al la batalejoj.

En Nižnevartovsk malsanaj geviroj kaj infanoj laboris tage kaj nokte kaj sendadis sekigitajn fiŝojn, berojn kaj aliajn produktojn al fronta zono. Ili ankaŭ vizitis hospitalojn por helpado al gevunditoj. Ilia devizo estis: "Ĉio por fronto, ĉio por venko!"

Triono de la vilaĝanoj revenis hejmen post la venko en la jaro 1945. Ili denove kaj plue evoluis la pacan vivon en la vilaĝo.

En 1960 en la vilaĝo, kiu havis pli ol 1 550 loĝantojn, oni trovis multe da lokoj kun nafto kaj natura gaso.

La vilaĝo rapide kreskis en urbeton, kaj en ĝi aperis 16 etaĝaj

domoj. Je la fino de 1971 en la urbo laboris pli ol 50 oficejoj kaj entreprenoj kaj loĝis pli ol 30 000 homoj.

En 1977 jam estis pli ol 200 mil loĝantoj. La Nižnevartovska regiono okupis gravan lokon en la lando per nafto.

Komence de 1997 la urbo okupis 270 kvadratajn kilometrojn kaj havis 238 mil loĝantojn de diversaj nacioj.

Nun la urbo estas bela, oportuna kaj komforta. Sur la stratoj estas abundaj arboj kaj floroj. Estas multaj lernejoj, bibliotekoj kaj magazenoj, kaj estas ankaŭ palaco de kulturo, altlernejoj kaj teknikaj lernejoj. Por junularo funkcias diskotekoj.

En la urbo estas flughaveno, fervoja stacio, rivera ŝipstacio. Ĉirkaŭ la urbo troviĝas, kiel antaŭe, grandega arbarego. ■

Urbeto de tajĝiĉjŭan

Teksto de LI YANFEN

Fotoj de LIU SIGONG

SUR la ebenaĵo de suda Hebei-provinco estas antikva urbeto, kiu estas ĉirkaŭita de nebulo kaj fragmitaro. Ĝi aspektas mistere kaj kviete. Ĝia nomo estas Guangfu. Pro tio, ke preskaŭ ĉiuj ĝiaj loĝantoj bone sin ekzercas per *tajĝiĉjŭan*, oni nomas ĝin ankaŭ “urbo de *tajĝiĉjŭan*”.

Tajĝiĉjŭan originis antaŭ 600 jaroj. Ĝi estas heredita luktarto de Chen-familio en Henan-provinco. En la 19-a jarcento Yang Luchan kaj Wu Yuxiang de Hebei-provinco vizitis tiun familion por studi la luktarton kaj fariĝis eminentaj kun propraj skoloj. La stilo de Yang karakteriziĝas per forteco kaj beleco de la movoj, dum tiu de Wu per delikateco kaj simpleco. Famiĝinte, ili klopodis disvastigi *tajĝiĉjŭan*. Yang instruis *tajĝiĉjŭan* en Pekino kaj havis multajn disĉiplojn; Wu verkis, por ke *tajĝiĉjŭan*

Matena korpo-ekzercado sur antikva murego

havu sian teorion. Ili estis loĝantoj de Guangfu.

En oktobro mi vizitis Guangfu. Tie mi vidis, ke oni praktikas *tajĝiĉjŭan* ĉie, aŭ surstrate, aŭ surkampe. La movoj de *tajĝiĉjŭan* estas malrapidaj, mildaj kaj kontinuaj, ne similaj al aliaj luktartoj rapidmovaj kaj fortaj. Dum la ekzercado *tajĝiĉjŭan*-istoj tiel absorbiĝas, kvazaŭ sin apartigante de la homa mondo.


Kio estas la esenco de *tajĝiĉjŭan*? En la modesta loĝejo de s-ro Li Disheng mi ricevis respondon. S-ro Li diris, ke *tajĝi* signifas universon. La antikvuloj nomis senlimajn spacon kaj tempon universo kaj opiniis, ke ĉio konsistas el pozitivo kaj negativo. Ekzemple, la ĉielo estas pozitivo kaj la tero negativo. La akordo de la ĉielo kaj tero kaŭzas ĉiajn estaĵojn. Ankaŭ homo, kiel unu el la estaĵoj, vivas laŭ la leĝo natura. Ĉiu homo estas ero en la universo. La teorio pri pozitivo kaj negativo, sin bazita sur “Yi Jing”, estas la plej antikva ĉina

filozofio kaj ankaŭ la esenco de *tajĝiĉjŭan*-teorio, kiu opinias, ke sano signifas sanan korpon kaj sanan spiriton. Kiam oni zorgas pri la problemoj de vivo, oni perdas la ekvilibron de sano kaj malsaniĝas. *Tajĝiĉjŭan* estas saniga. Farante ĝin, oni movas korpopartojn cirkle. Tio utilas por akceli cirkuladon de vitala energio. Dum la ekzercado de *tajĝiĉjŭan* oni bezonas ankaŭ kvietecon, t.e. koncentri penson por kvietigi spiriton.

Antikvuloj diris, ke movado sen kvieteco malsanigas la spiriton; kaj kvieteco sen movo malvigligas la korpon. Tial la teorio de *tajĝiĉjŭan* substrekas, ke por sanigi korpon necesas sanigi spiriton. Oni ne devas logiĝi de volupto kaj mono, sed respekti la universon. Nur tiel, oni povas esti animita de *tajĝiĉjŭan*. Se oni respektas la universon, ĉi tiu respektas lin; se oni damaĝas la universon, ĉi tiu damaĝas lin. Nur en plena harmonio kun la universo oni povas ĝui feliĉon. Ne konante tion, oni malfacile povas spirite profiti, eĉ se li diligente sin ekzercas per *tajĝiĉjŭan*.

En tio oni povas vidi, ke la *tajĝiĉjŭan*-istoj bone konas la antikvan kulturon. Ne estas mirinde, ke inter ili la sanaj maljunuloj aspektas kiel alte klerigitaj. En interparolo kun s-ro Li mi sciigis, ke li diplomiĝis el la altnivela ĉina altlernejo — Qinghua-universitato, iam laboris kiel profesoro kaj tradukisto de la japana kaj angla lingvoj, kaj havas multe da disĉiploj.

La loĝantoj de la urbeto estas tre gastamaj. Ili jam okazigis kvin kunvenojn de *tajĝiĉjŭan* kaj stariĝis kelkdek fakajn lernejojn por disvastigi *tajĝiĉjŭan* kaj ĝian teorion. La vizitantoj tre enbias la senzorgan kaj modestan vivon de la loĝantoj. ■





Junaj lernantoj de *Tajicjuan*-leĝejo
en la urbeto



Tajicjuan-domo de Yang-familio
en la urbeto

Juna kaj maljunaj *tajicjuan*-amantoj






Ĉe antikva murego



Tajĝiĉjŭan-familio

Kiel bele li ludas!



ĈINIO

● La 5-an de februaro 1999 okazis en Pekino kunsido de la ĉina societo "Amikoj de Esperanto", kies honora prezidanto Chen Yuan, prezidanto Chai Zemin kaj dekelkaj aliaj membroj ĉeestis ĝin antaŭ la Printempa Festo. Ili deziris pli multe kontribui al la disvastigo de Esperanto. Pli multaj ĉinaj eminentuloj en diversaj rondoj iĝos membroj de la societo.

FRANCIO

● En Saint-Pompain 79160 (Deux-Sevres), inaŭguro de "Place de l' Esperanto" okazos sabate la 29-an de majo, matene je la 11-a. Ĉiuj e-istaj amikoj estas invitataj. Oni povas sendi gratulojn al la urbestro (post la konsilantara aprobo). Pliajn informojn povos doni: Georges Menossi, rue des Monfortains, 79160 Saint-Pompain (0549061608); Monique Assailly, rue de la Perriere, 79160 Saint-Pompain (0549060203).

(Georges Menossi)

● Same kiel pasintjare okazos en 1999 la premio "la Verko de la Jaro 1998" organizita de Koooperativo de Literatura Foiro. Kandidatajn titolojn proponas almenaŭ tri membroj de la Esperanta PEN-Centro. La premio estas referendume asignata ĉiujare de la abonantoj de la revuo Literatura Foiro jen al poezia jen al proza verko. Por 1999 kandidatas nur prozaj



Esperantistoj de Herzberg, Germanio, en la Zamenhofa festo en la 23-a de decembro 1998

titoloj surmerkatigitaj en 1997-1998. La libro "El miaj sonoraj soloj" de Miguel Fernandez Martin gajnis la premion "la Verko de la jaro 1997".

(Mari-Roza Vilain-de Wolf)

KANADO

● Denove vivas la Kebekia Esperantista Junulara Organizo (KEJO). Dum kunsido okazinta en Montrealo la 13-an de decembro 1998, estis decidita pluivigi la organizon kiel memstaran asocion, kaj oni elektis novan estraron. La renovigita KEJO plu flegos bonajn rilatojn kun la Esperanto-Societo Kebekia. (Sylvain Auclair)

La Kultura Asocio Esperantista de Hispanio festas la Zamenhofan feston kaj omaĝas florojn al la Zamenhofa statuo en Sabadell.



NEDERLANDO

● Eblas vojaĝi ne nur per aŭtobusoj al IJK, sed ankaŭ per bicikloj! Kontaktu BEMI (Biciklista E-Movado Internacia) ĉe <bemi@saluton.iaf.nl> por pli da informoj. Cetere okazos karavano al Berlino por la UK, kaj karavano al OKSEJT en Tihvin apud Peterburgo (ekiro de Geborg, Svedio, tra irante Finnlandon).

(Yvonne van den Hork)

POLLANDO

● Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, organizas la 21-an Internacian Feriadon de Esperantistoj kaj Naturamantoj en la 6-12-a de julio 1999. La aranĝo okazos en la atrakcia kaj tre ĉarma ripozloko Mielno. Korespond-adreso: Pola Esperanto-Asocio, poŝtkesto 30, 75-016 Koszalin-1, Pollando. Telefono: PL-0048, Koszalin-94/3404-563 (petu: Baranowski).

(Pola Esperanto-Asocio)

● Freŝo '99 okazos — kiel kutime — komence de la somero, t.e. de la 30-a de junio ĝis la 4-a de julio. La centra parto de olŝtina renkontiĝo estas kvizoj kun riĉaj monpremioj. Vizitu la retpaĝon kaj Freŝo-n: <http://www.art.olsztyn.pl/fresxo/>.

(Marian Zdankowski)



Familioj sur altebenajo

Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

En la pasinta somero mi veturis laŭ la Sichuan-Tibeta Ŝoseo en sudokcidenta Ĉinio kaj vizitis kelkajn montvilaĝojn de tibet-nacianoj en Luhuo-gubernio. Tie etendiĝas nove ekspluatitaj ŝtupar-kampoj, prosperas verdaj plantaĵoj, belas tibet-stilaj domoj inter arboj kaj floroj. Nokte varias nuboj kaj sub la hela luno bojadas hundoj.

En Luhuo-gubernio altas montoj kaj profundas valoj. En la malnova socio la loko estis destinita por ekzili malliberulojn. La izolita medio, postrestinta penso kaj malnova koncepto longatempe malhelpis la tiean ekonomian disvolviĝon kaj katenis la lokanojn, kiuj vivis malriĉan vivon en ĉiuj generacioj.


Dank' al la politiko de reformado kaj pordomalfermo ekpraktikita en la loko antaŭ dek jaroj, la lokanoj iom post iom forlasis la malnovan tradician koncepton, akceptis la novan penson kaj eliris el la montaro. Hodiaŭ iuj tibet-nacianoj de la montvilaĝoj sin okupas pri komercado, aliaj pri transportado kaj triaj pri konstruado. Nun la lokanoj donas grandan atenton al la konstruado de loĝdomoj. En la montvilaĝoj, kiujn mi vizitis, la antaŭaj terdometoj estis anstataŭitaj de nove konstruitaj tibet-stilaj duetaĝaj domoj. La lokanoj kun plena fido kreas la feliĉan vivon per siaj diligentaj manoj.



Butiko en montvilaĝo




Tibet-nacianoj vendantaj felon



Tibet-stilaj loĝdomoj

Preparado de buter-teo






Floroj sur balkono

Loĝejo de familio sin okupanta pri transportado



En legomĝardeno antaŭ la domo



Yu Chunshun en Lopnur

de ZHOU SHAOHUA

EKSPEDICIADO estas natura emo de la homaro. Se niaj prapatroj ne esplorus la mondon nekonatan riskante sian vivon, ni manĝus krudan viandon ankoraŭ hodiaŭ. En la 16-a jarcento ĉina ŝtatoficisto Xu Xiake forlasis sian komfortan vivon kaj prenis ekspediciadon kiel sian taskon. En la komenco li nur volis serĉi la fonton de Yangzi-rivero, kiu fluas preter lia domo. Li survojiĝis, ne kun ĉevalo, opiniante, ke oni ne povas detale rigardi rajdante surĉevalo; nek kun akompananto, ĉar laŭ li oni ne povas koncentri sian atenton kune kun aliaj; krome, li prenis speciale vojojn senhomajn, krutajn kaj danĝerajn, kiujn frekventis sovaĝaj bestoj. Finfine, li renkontis miraklon, kiun neniam vidis ordinaraj homoj, havis gravajn sciencajn eltrovojn kaj lasis al posteuloj ege valorajn materialojn, el kiuj multaj hodiaŭ ankoraŭ ne estas konataj.

En la nuna socio multaj homoj kutimas ĝui la fruktojn de moderna civilizacio kaj interesiĝas pri luksa aŭto, altklasa domo kaj granda sumo da nomo.

Lia vivo estingiĝis en Lopnur

Malfortiĝis ilia koncepto pri ekspediciado. Sed Yu Chunshun ne estis tia homo. Kiam alilokanoj torentis al lia urbo Ŝanhajo por ĉasi nomon, li ekŝiĝis kaj vojaĝis malproksimen.

PIEDIRI ESTAS HARDADO

En la fino de la 20-a jc., kiam la trafikiloj ege evoluis, Yu preferis piediri. Kiel asketo kun longaj haroj kaj plenbarbo li portis ĉifonajn vestojn, tamen okulfrapis sur lia veŝto ruĝaj vortoj "Piediru tra Ĉinio" kaj sur lia tornistro — "1988-1998".

Jen lia plano: en tiuj dek jaroj li finos la vizitadon al la loĝlokoj de la 55 ĉinaj nacimalplimultoj kaj plenumos 80 esplorajn taskojn, forlasante nenium okazon por fari prelegon pri "Amo al Ĉinio". Li diris: "Mi, sendita de neni, ne ĉasas famon nek monon, ne zorgante ĉu estos rezulto. Mi ne volas vane vivi, esperante kunfandi mian propran vivon kun la kulturo de la epoko kaj fariĝi kultura asketo, kiu vojaĝas tra Ĉinio."

Ne ĉiuj kapablas elporti la veteron en grandaj montoj. La naturo dotis Yu per forta korpo destinita por vojaĝi kien ajn. La dekjara laboro en kamparo havigis al li neflekseblan karakteron, kaj krome li estis bone klerigita. Pro tio li tutsole vojaĝis kun aplombo kaj memfido, malgraŭ multaj malfaciloj. Sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo je 6 700 m super la marnivelo, kie ege mankas oksigeno, lia vizaĝo purpuriĝis kaj lia ventro pufiĝis kiel tamburo. En tiu situacio li povus morti eĉ pro malgrava malvarmumo, sed li ne retiriĝis. Manĝante peklaĵon kune kun malgrandaj nigraj insektoj, kiuj flugis en lian buŝon, li piediris tra la senhoma zono Ali kaj konkeris la trian poluson de la mondo. Dank' al sia braveco, dum ok jaroj li jam vizitis 34 nacimalplimultajn regionojn, transiris kvin ŝoseojn sur krutaĵoj, plenumis 60 esplorajn taskojn, faris 150 prelegojn, post

(Daŭrigo sur p. 50)

Baj-oj ŝatas blankon

Ŝi portas knabon kun ĉapo en formo de figo-kapo



Teksto de YANG ZHENHUA
Fotoj de YANG SHIBIN

La Dali-a Baj-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Yunnan estas pli evoluinta ekonomie kaj kulture ol aliaj nacimalplimultaj regionoj en sudokcidenta Ĉinio. Jam antaŭ 3 000 jaroj baj-oj vivis ĉe Erhai-lago kaj laboris per hakilo kaj tranĉilo el ŝtono kaj besta ostoj. Iliaj vestoj montras naciajn karakterizaĵojn kaj specialan estetikon formiĝintan dum longa laborado. La baj-oj ŝatas blankon kaj rigardas tiun koloron sublimum, kaj iliaj vestoj okulfrapas per blanko kun ornamo de kolorbrilaj kaj kroĉet-broditaj pecoj.

La viraj vestoj estas simplaj kaj la maljunulaj helkoloraj, dum la virinaj kaj infanaj kolorriĉaj. Ĝenerale knabinoj portas ĉemizon blankan aŭ helkoloran kun borderaĵoj ĉe la manumoj kaj superveston ruĝan aŭ lazuran. Ilia pantalono estas blanka aŭ helkolora kaj antaŭtuko delikate brodita. Ili reliefigas sian belan figuron per zono kaj ĉarmigas sin per jadaj braceletoj, broditaj ŝuoj kaj plektitaj haroj ornamitaj per ruĝa ŝnureto kaj blanka franĝo pendanta ĉe la maldekstra flanko.

Virinoj zonitaj per brodita tuko





Baj-a viro kun kapornamo




Maljunulino vendanta lig-finkturitajn tukojn




Kapornamo de baj-
aj knabinoj

Baj-aj geamantoj en boato sur Erhai-lago



Mezaĝa virino en nacia vesto



Prezentado de
"Preludo de la
Printempa Festo"
en fama aŭstria
koncertejo

Brilanta ĉina muziko

En 1960 fondiĝis la Centra Nacimuzika Filharmonio de Ĉinio, kiu estas ŝtata nacimuzika societo.

En la pasintaj 30 jaroj, por diskonigi ĉinajn naciajn kaj popolajn muzikaĵojn, la filharmonio kolektis kaj ordigis multe da tradiciaj naciaj kaj popolaj muzikaĵoj, kiuj estis unu post alia surscenigitaj. Dume kelkaj novaj naciaj muzikaĵoj verkiĝis kaj pliriĉigis la repertuaron, en kiu elstariĝis "En printempa luna nokto ĉe rivero", "Luno en Erquan-fonto", "Preludo de la Printempa Festo", "Verda lago en printempo" kaj "La kapriĉo Granda Muro", kiuj plaĉas al aŭskultantoj.

Krom la grandaj kunludoj kaj ĥoro la filharmonio ludas ankaŭ muzikon de Guangdong kaj blov- kaj perkutmuzikon de Hebei.

La filharmonio okazigis grandan prezentadon ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en Usono, Britio, Francio, Aŭstrio, Japanio, Singapuro kaj





Wei Yuru, ludistino de *gongjūan-o*




Ĉinaj muzikistoj antaŭ la Blanka Domo en Usono

Interŝanĝo de ludartoj



Ĥoro



aliaj kelkdek landoj. La prezentado estis laŭdata de aŭskultantoj.

La 27-an de januaro 1998, antaŭvespere de la tradicia ĉina Printempa Festo, la filharmonio alportis la imponan kaj ĝojigan "Preludon de la Printempa Festo" en faman aŭstrian koncertejon. La aŭskultantoj el Vieno raviĝis de la ĉina nacia arto kaj aplaudadis longe.



Li Ying, ludistino de *guqin*-o



Li Guangcai ludas *suona*-on.



Kantistino Xie Lin



Song Fei, ludistino de *erhu*-o



Zeng Shaobin, ludistino de fluto

Karmemore al la patrino

de RIMO

LA tempo flugas rapide. En palpebruma daŭro forpasis 25 jaroj post kiam mortis mia patrino. Mi ofte sonĝas pri ŝi.

Mia patrino devenis de intelektula familio. En la tempo, kiam ŝi estis juna, nur tre malmultaj virinoj estis klerigitaj, tamen mia patrino estis feliĉa ricevi edukadon. Antaŭ sia edziniĝo ŝi jam laboris kiel kuracistino.

Mi memoras, ke ĉiutage mia patrino iris al laboro frumatene kaj revenis hejmen malfrue vespere. Eĉ hejme ŝi estis tre okupata. Krom dommastrumado, ŝi ankaŭ multe legis fakajn librojn kaj ofte helpis min en la lernado. Mia patro estis silentema kaj malofte faris hejmajn laborojn.

Mia familio estis bonhava, sed multaj aliaj familioj vivis malfacile siatempe. Mia patrino ofte monhelpis malriĉajn parencojn, najbarojn kaj kolegojn malgraŭ ke tio faris al ni multajn elspezojn. Ŝi ofte instruis al mi laŭeble helpi la malfortajn kaj malriĉajn.

Iu malgranda afero ĉiam ondas en mia koro.

Estis obskura nokto en frosta vintro. Mia patro forestis kaj hejme restis nur la patrino kaj mi. La patrino malsaniĝis. Ŝi tremis de febro kaj kuŝis en lito. Mi sidis ĉe ŝia lito kaj legis en pala lumo. Ĉirkaŭe regis silento escepte de la susurado de arbo-branĉoj. La patrino turnis sin jen

dekstren, jen maldekstren. Videblis, ke ŝi sentas sin malbone.

Subite aŭdiĝis frapo je la pordo. Jen ankoraŭfoje.

“Kiu en tiel malfrua horo?” kun maltrankvilo mi levigis, hastis al la pordo, malfermis ĝin kaj vidis, ke antaŭ mi staras virino ĉ. 40-jara, kun malserena vizaĝo.

“Pardonon. Ĉu tio estas la hejmo de kuracistino Z?” demandis la virino per mallaŭta voĉo.

“Jes. Kion vi volas?”

“Mia filo grave malsaniĝis. Ĉu kuracistino Z...”

“Pardonon. Ankaŭ mia patrino malsanas kaj nun febras. Bonvolu turni vin al alia kuracisto aŭ transportu vian filon al hospitalo por ne prokrasti la kuracon.”

“Ho ve!” Morta paleco kovris ŝian vizaĝon.

Post momenta hezito ŝi diris ĝis-revidon kaj foriris.

Ĝuste en tiu momento mi aŭdis malfortan vokon de mia patrino.

“Ho, ne! Mia malsano ne gravas. Mi tuj iros kuraci la infanon,” diris mia patrino kun vizaĝo ruĝiĝinta pro febro.

“Ĉu vi povas, panjo?” mi turnis min al la patrino kaj demandis kun granda maltrankvilo.



La aŭtoro

La mezaĝulino endomiĝis kaj diris: “Koran dankon, doktoro. Sed ne moviĝu.”

Tamen mia patrino ordonis al mi porti la medikamentan keston kaj eldomiĝis, subtenate de mi.

Tiam batis la dekdua horo. Eksterdome siblis frosta vento, flirtis neĝflokaj. Regis netolerebla malvarmo, kiu penetris ĝis miaj ostoj, kvankam mi portis dikan vatitan jakon. Mia patrino stumble movis siajn piedojn sur la neĝkovrita vojo.

La vojo ne estis longa, sed en tiu nokto ĝi ŝajnis multe pli longa.

Finfine ni alvenis al iu kaduka kabano. La malgranda domo estis en malordo. En granda ligna lito sub ĉifona vatita kovrilo kuŝis malsana, malgrasa knabo 6-7-jara, kiu kun larĝe malfermitaj okuloj rigardis nin. Mia koro spasme doloris.

Antaŭ la malsana knabo mia patrino, tute ekster mia atendo, fariĝis multe pli vigla ol en sia hejmo. Ŝi aŭskultis korbataĉon de la malsanulo, palpis liajn pulsojn, observis liajn gorĝon kaj langon, mezuris lian temperaturon kaj diris kun serioza mieno al la mezaĝulino: “Nun mi preskribu recepton kaj donu medikamenton sufiĉan por unu tago. Morgaŭ vi nepre portu la knabon al hospitalo.”

Sur la vizaĝo de la mezaĝulino legeblis hezito. Ŝi balbutis kelkajn vortojn malklarajn, kiujn mi ne komprenis nek mia patrino. Tamen mia patrino verŝajne jam

(Daŭrigo sur p. 49)

Familia edukado en la antikva Ĉinio

de PANG NAIYING

FAMA ĉina historiisto Sima Guang (1019-1086) diris, ke al la patrinoj ĝenerale ne mankas patrina amo, sed ofte mankas al ili la koncepto pri edukado. Tro da amo kaj manko de edukado povas konduki la gefilojn al malbonkonduito. Dum jarmiloj la malproksimvidaj personoj ĉiam alte taksis la familian edukadon kaj prenis siajn vivsperton, kriteriojn pri ofitado, lernado, administrado de la hejmo kaj sia socia konduto kiel familian instruon al la posteuloj kaj senrezerve heredigis tiujn instruojn al ili. Iuj eĉ skribis tion en la familian genealogion, por ke la posteuloj heredu tion generacion post generacio. En tio estas ja multaj maksimumoj.

EDUKI LA GEFILOJN FRUE

Antikvaj ĉinoj alte taksis la fruan edukadon de siaj gefiloj. Literaturisto Yan Zhitui (531-591) diris en sia "Admono de Lernado" pri familia instruado, ke la homa atento estas facile fiksebla en la infanaĝo kaj facile disigebla post plenkresko, tial oni devas eduki la infanojn pli frue por ne perdi la bonan ŝancon. Li opiniis ankaŭ, ke se malsukcesas la frua edukado, do estas pli grava la malfrua lernado. La frua lernado similas al matena sunlumo, kiu lumigas la tutan homan vivon, dum la malfrua lernado similas al kandela lumo, kiu evitigas al la homoj vojeraron. La lernado ĉiam donas al la homoj sciojn kaj lumigas al ili la vojon.

Sima Guang prezentis saman opinion de alia flanko. Li diris, ke iuj opinias, ke la infanoj estas naivaj kaj la tro frua edukado estas ne tiel sukcesa kiel edukado post ilia plenkresko, sed efektive, sen ĝustatempa edukado, la tro dorlotataj infanoj povas ellerni malbonan kutimon, tiaokaze estas tre malfacile ilin korekti.

Iuj proponis la edukadon antaŭ naskiĝo de la infanoj. Antikva libro notis, ke post gravediĝo de la patrino de reĝo Wen de Zhou-dinastio (ĉ. 11-a jc. a.K.), ŝi rifuzis akrajn manĝaĵojn, malvirtajn vortojn kaj voluptajn muzikaĵojn. Vespere ŝi petis deklami poemojn kaj rakonti seriozajn aferojn. Ŝi vivis la

ĉiutagan vivon komplete laŭ reguloj. Ŝi neniam sidis sur malbone sternita mato... Antikvaj ĉinoj opiniis, ke nur tiamaniere la infanoj estos belaj kaj saĝaj post naskiĝo, ĉar jam en la utero la fetoj ricevas bonan edifon. Oni diris: "La infano fariĝos bonkora, se ĝi estas edifita de noblaj agoj. La infano fariĝos malvirta, se ĝi estas edifita de malbonaj agoj." Pro ĉio ĉi la patrinoj devas doni al sia infano bonan edukon jam antaŭ ĝia naskiĝo.

Moderna medicino pledas por eŭgeniko. Kvankam en Ĉinio nun furoras eŭgeniko, tamen nur malmultaj konas ĝian originon.

LERNADO KAJ BONKONDUTO

"Prizorgi la tutan landon estas la plej grava afero." Antikvaj ĉinoj rigardis tion nobla koncepto, opiniante, ke la intelektuloj nepre devas ŝtatoficiistiĝi post diligenta lernado. Kiam oni ne sukcesas en la oficistiĝo, oni devas tamen ankaŭ atenti sian konduton, kio kompreneble ne disiĝas de lernado. Jen diligenta lernado estas grava enhavo de la familia edukado.

Dramisto Jiang Shiquan (1725-1785) perdis sian patron tre frue kaj en lia 4-jara aĝo lia patrino komencis instrui al li legadon. Ĉar tiam li estis tro juna kaj liaj manoj ne povis firme teni penikon, tial la patrino faris multajn bambuajn slipojn kaj instruis al li fari ideogramojn per la slipoj. Tage, kiam la patrino taksis, ŝi metis libron sur siajn genuojn, por ke la filo legu ĝin oportune. Kiam la filo lernis maldiligente, la patrino batis lin per vergo, sed ŝi ĉiam bedaŭris tion. Vespere la patrino kaj filo kune laŭtleĝis sur lito. En frosta tago la patrino malbutonis sian jakon kaj per sia brusto varmigus la filon. Se la filo endormiĝis, ŝi mallaŭte vekis lin, por ke li daŭrigu lernadon... Ŝiaj fratinoj ofte admonis ŝin: "Vi havas nur unu solan filon. Kial vi tiel severe traktas lin?" Ŝi respondis: "Se mi havus kelkajn filojn, mi tion ne farus. Nun mi havas nur unu, li nepre devas esti talenta!" Poste, kiam la patrino malsaniĝis, la filo multe maltrankviliĝis, ne sciante, kiel konsoli ŝin. Ŝi diris al sia filo: "Mi estos tre ĝoja, se vi bone recitos la tekstojn, kiujn vi lernis." Tial la filo laŭte recitis la tekstojn por akompani la malsanan patrinon...

La ĉinoj deziregas, ke iliaj filoj estu promesplenaj. La nunaj ĉinoj donas grandan atenton al la inteligenteco de siaj gefiloj kaj laŭeble kontentigas ilian materian bezonon, dum la antikvuloj opiniis, ke bonkonduito estas same grava kiel kleriĝo kaj donis grandan atenton al legado de libro kaj kulturado de bonkonduito. Ili edukis siajn posteulojn, ke ili estu diligentaj kaj modestaj.

Zuo Zongtang estis grava ŝtatoficisto de Qing-dinastio (1644-1911). Li longe oficis en la loko malproksima de lia hejmloko. Li ofte skribis al siaj filoj, admonante ilin diligente studi kaj preni defendon de la popolo kiel sian devon kaj postulante, ke la filoj ĉiumonate sendu siajn hejmtaskojn al li. Foje li ricevis leteron, kiu informis, ke por celebri la 60-an datrevenon de lia naskiĝo ili rekonstruis la malnovan domon. Li eksplodis de kolero kaj tuj skribis al la familio: "Nun estas malfacilaj tagoj por nia lando. Mi militas en la landlima regiono, spite grandan danĝeron, sed vi solenas la datrevenon de mia naskiĝo. Kiel absurda tio estas! Ĉu vi vere obeas min kaj amas min? La supra obeo estas malpli ol memkulturo. En la okuloj de Zuo la ŝtataj aferoj estas pli gravaj ol la familiaj. Li neniel permesis, ke liaj posteuloj estu diboĉemaj kaj pigraj, malgraŭ ke li estis tre riĉa.

"Ĉiuj dinastioj sukcesis pro diligenteo kaj modesteco kaj malsukcesis pro diboĉado. Tiel statis ankaŭ ĉiuj familioj." Antikvaj ĉinoj opiniis, ke justeco kaj honesteco evitigas la oficistojn de koruptiĝo kaj diligenteo kaj ŝparemo evitigas la homojn de avido. Ŝtatoficisto Zhou Yi (1506-1569) de Ming-dinastio (1368-1644) diris en "Admono al la filo": "Oni devas esti modesta en la vivo kaj maltrankvila pri eventuala malriĉeco. Simpla teo kaj simplaj manĝaĵoj kaj vestoj ja estas bonaj por mi." Li estis honesta kaj nur unu jaron post sia oficistiĝo li akuzis plurajn potencajn korteganojn. Dum sia vivo li estis dufoje enkarcerigita, tamen lia honesteco restis neniom ŝanĝita. Pro ofendo al la suvereno li estis eksigita. Guberniestro de Qing-dinastio Tang Zhen (1630-1704) diris al sia filo: "Bone memkulturita homo estas pli nobla ol ĉefministro, malgraŭ ke li estas dumviva plebano."

En la ĉina historio ja estis multaj tiaj honestaj ŝtatoficistoj. Kiel patro, ili zorgis pri la perspektivo de siaj posteuloj kaj iuj eĉ ne heredigis al siaj posteuloj bienon. Ili opiniis, ke luksa vivo ofte kondukas al maldiligenteco. Samgepatraj fratoj iam eĉ malamike traktis unu la alian pro heredaĵoj. Post fordiboĉo oni eĉ faris ŝteladon... Tial "estas pli grava la klasika verko ol sako da oro por la posteuloj." En iliaj okuloj honesteco estas granda heredaĵo, tre grava por la posteuloj.

ESTI SINGARDEMA PRI AMIKIĜO

"Por esti bonkondata, oni devas amikiĝi kun

honestaj homoj." En la antikveco oni ofte tiel admonis siajn gefilojn.

Granda edukisto Konfuceo (551-479 a.K.) opiniis, ke oni devas amikiĝi kun homoj noblaj kaj kapablaj. Jen kriterio de la antikvuloj por elekto de amikoj. Konfuceo opiniis ankaŭ, ke amikoj devas esti honestaj, grandanimaj kaj erudiciaj. En la periodo de Tri Regnoj (220-265) estis erudiciulo Xin Pi de Wei-regno. Li estis honesta kaj ne kontaktis malbonkondatajn korteganojn. Lia filo timis, ke tio damaĝos la patron, kaj admonis lin ŝanĝi sian sintenon kaj milde trakti tiajn oficistojn, sed Xin Pi refutis: "Ja estas bone, ke oni ne pomocios min, se mi ne amikiĝos kun la malicaj korteganoj." Lia nobla konduto donis bonan ekzemplon al lia filo.

"Loĝo kun bonkoruloj egalas al loĝo en aroma domo kaj iom post iom ankaŭ la loĝantoj mem fariĝas aromaj, sed loĝo kun maliculoj egalas al loĝo en butikoj de peklitaj fiŝoj kaj iom post iom ankaŭ la loĝantoj fariĝas malbonodoraj." Jen vortoj de Yan Zhitui, fama esploristo pri familia edukado. El tio vidiĝas, ke jam antaŭ pli ol 2 000 jaroj la antikvuloj rimarkis la median influon sur la infanojn.

Grava konfuceano Mengzi, je pli ol 100 jaroj malpli aĝa ol Konfuceo, vivis malriĉe en sia juneco apud tombejo. Lia patrino rimarkis, ke la filo estis soleca kaj ofte ludis entombigon de mortintoj, tial ŝi translokis la hejmon en komercan kvartalon. Post nelonge la knabo eklernis kriadon de kolportistoj. La patrino do translokis la hejmon al loko proksima al lernejo kaj de tiam Mengzi interesiĝis pri kulto en la lernejo. Severe edukite de la patrino, Mengzi diligente lernis kaj finfine fariĝis granda konfuceano.

Koncerne la rilatojn inter la popolo, ŝtato kaj suvereno, Mengzi opiniis, ke la popolo estas la plej grava el la tri, la ŝtata reĝimo la dua kaj la suvereno la lasta." Li pledis por humana regado kaj riĉigo de la popolo. Li opiniis, ke oni devas moderigi sian postulon al la popolo kaj fari ĉion eblan, por ke ĉi tiu ne ŝtelu nek rabu pro malriĉeco. Li donis grandan atenton al la publika opinio. Li diris, ke la justaj homoj estas multe helpataj, dum la maljustaj malmulte helpataj. Kaj justeco estas ĉiam en la manoj de la popolo. Kiu estas malŝatata de la popolo, tiu perdos la potencon. Tia doktrino de Mengzi estis alte taksata de multaj suverenoj en diversaj dinastioj. Se ne estus tri translokiĝoj de la hejmo far lia patrino, eble en la ĉina historio ne estus tiu eminenta pensulo.

Kompreneble la ideologio de la patrino de Mengzi montras malŝaton al la laboranta popolo, tio estis kaŭzita de la epoka limigo, sed estas rimarkinde, ke en la feŭda socio, en kiu la viroj estis rigardataj kiel noblaj kaj la virinoj malnoblaj, la erudiciuloj plejparte estis viroj, dum virinoj povis nur zorgi pri siaj hejmaj laboroj. Kompare kun tio, la nunaj virinoj estas multe pli feliĉaj. ■



Miao Zhihe

Montvilaĝa instruistino

Nova elementa lernejo en la montvilaĝo



Teksto kaj fotoj de
YANG XIUYUN

Nur 40 familioj kun iom pli ol 190 homoj vivas en montvilaĝo de ji-oj (ĉina nacimalplimulto) — Pukeyingxin-vilaĝo, Fuyuan-gubernio, Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio. Sen ŝoseo ili devas pene transiri montojn por telekomunikado kaj leter-ekspedo. Miao Zhihe, kiu edziniĝis al viro de tiu vilaĝo antaŭ 25 jaroj, estas la sola han-o en la vilaĝo..

Preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj estis analfabetoj, kaj estis tro malfacile



Kun ji-a virino

Miao Zhihe solvanta demandojn de lernantoj



Eskorto de lernantoj hejmen



por geknaboj viziti 10 km. foran lernejon. Miao dediĉis sin al instruado. Dank' al helpo de sia edzo, ŝi ekuzis sian domon kiel klasĉambrojn, kiuj en 1983 fariĝis la unua elementa lernejo en la vilaĝo. Ŝi kompilis leksikonon el pli ol 900 vortoj ji-aj kaj han-aj kaj kreis du-lingvan instruadon, kiu estis tuj akceptita de la geknaboj. En la vilaĝo aŭdiĝis ilia laŭta legado.

Jam pli ol 100 geknaboj diplomiĝis el la lernejo. Luj el ili iris en gubernian mezlernejon, iuj post diplomiĝo el mezlernejo laboris en urbo, kaj iuj fariĝis agrikulturaj teknikistoj en la hejmloko. La vilaĝanoj diris: "Estas feliĉo por la geknaboj, ke Miao venis al la ji-a vilaĝo. Ŝi estas bona instruistino de la vilaĝo."

Ĉinoj kaj televido



La unua televidilo en la kamparo

de CHI QIAN

EN Ĉinio la televida afero startis relative malfrue. De 1958, kiam ekfunkciis la unua televida stacio, ĝis 1978 televido estis nekomprenebla por plejparto de la ĉinoj. De tiam 20 jaroj pasis. Hodiaŭ laŭstatistike 340 milionoj da ĉinaj familioj posedas 317 milionojn da televidiloj kaj la nombro de televidantoj superis 1.094 miliardojn. Ĉiflanke oni povas diri, ke Ĉinio enviciĝis en grandajn televidajn landojn kaj televido donas influon grandan kaj profundan al la ĉinaj televidantoj, la plej multaj en la mondo.

TELEVIDILO VIDIĜAS PRESKAŬ EN ĈIUJ HEJMOJ

En la 2-a de septembro 1958

ekfunkciis la Pekina Televida Stacio (la nuna Ĉina Centra Televida Stacio). Siatempe la televidaj ondoj kovris nur Pekinon kaj en la loko estis nur 50 televidiloj. Sen videoregistratoro ĉiuj programeroj estis rekte elsenditaj. La unua ĉina televida teatro "Buŝo da kuko el maizo kaj legomo" estis prezentita en elsendejo de la televida stacio. Krome la bildaj signaloj estis tiel malklaraj, ke oni ne povis distingi en longa tempo la vizaĝon de la unua ĉina televidisto Shen Li. Kaj Shen mem vidis sian propran aspekton sur televida ekrano nur en la 70-aj jaroj. En tiu periodo la ĉinoj plejparte konis la eksteran mondon nur per ĵurnaloj kaj radio.

Por la nunaj junuloj, kiuj emas sin amuzi per komputilo kaj reprogramoj, malfacile imagas al si,

ke televido estis luksa sonĝo por iliaj gepatroj. Plie, ili ne povas kompreni la aferon aĉeti televidilon laŭ kupono. Ĉe la fino de la 70-aj jaroj ordinaraj ĉinoj, kiuj malmulte lukris kaj volis aĉeti televidilon, devis unue ŝpari monon kun la sumo preskaŭ egala al la tutjara salajro kaj poste havigi al si la kuponon. Mi klare memoras, ke en 1977 mia familio aĉetis 9-colan nigra-blankan televidilon, post tio, ĉiuvespere niaj najbaroj gatis ĉe ni por televidado. Ĝenerale dirite, tiam televidilon posedis nur grandaj establoj, lernejoj kaj fabrikoj. Tiam vespere ofte videblis, ke dekoj da homoj kolektiĝis antaŭ unu televidilo, etendis ĉiu sian kolon kaj kune ĝuis kun granda plezuro televidajn programerojn tre monotonajn por la hodiaŭaj homoj el tre malmultaj frekvencaj kanaloj. Tamen, ĝuste tiuj programeroj alportis grandan ĝojon al la tiamaj ĉinoj, vivantaj la vivon monotonan, kaj malfermis al ili fenestron por koni la eksteran mondon.

En la 80-aj jaroj televidaj stacioj multe pliiĝis en Ĉinio. Ĉe la fino de 1994 Ĉinio posedis 3 125 televidajn staciojn, kaj televidiloj ne plu estis komercaĵo malfacile aĉetebla. En ordinaraj familioj koloraj televidiloj kun granda ekrano anstataŭis la nigra-blankajn kun malgranda ekrano.

TELEVIDO KAJ LA VIVO DE ĈINOJ

Verkistino Huang Beijia kaj ŝiaj familianoj malofte kune te-

levidas. Pri tio ŝi diris: "Mia edzo kutimas ŝanĝi senĉese frekvencajn kanalojn per teleregilo kaj fragmentigi ĉiujn programerojn, sed mi ŝatas rigardi iun programeron de la komenco ĝis la fino, eĉ reklamojn mi ne preterlasas." Iuj infanoj neniam tediĝas pri karikaturoj filmoj, ekz., "Policestro Nigra Kato" distris multajn infanojn.

Nuntempe en Ĉinio preskaŭ ĉiu familio havas televidilon, iuj eĉ 2 aŭ 3. Post taga laboro, sidante en sofo, oni televidas novaĵojn aŭ amuzajn programerojn por ripozo. Laŭ nova statistiko ĉiutage ĉinoj ĝuas televidon meznombre 2 horojn kaj 11 minutojn. Pro tio iuj prenis televidadon kiel la 5-an elementon de la vivo de ĉinoj post vestoj, manĝoj, loĝejo kaj trafiko.

Kvankam la malbona influo de televido jam vekis ĝeneralan atenton de la publiko, pli kaj pli multaj eŭropanoj kaj usonanoj partoprenas en la movado "sentelevida semajno", tamen en Ĉinio la influo kaj altira forto de televido estas tiel grandaj, ke neniu alia rimedo povas rivali. Ni ne parolu pri grandaj televidaj filmoj, kiuj allogis al si tre multajn spektant-

ojn, nek pri sapaj operoj el Japanio, Hongkong kaj Taiwan, kiuj vekis grandan intereson de ĉinaj televidantoj, sole la arta vespero de la Printempa Festo ĉiujare elsendita de la Ĉina Centra Televida Stacio montras la gravecon de televido por la vivo de la ĉina popolo.

Antaŭvesperon de la Printempa Festo de 1983, de la 20-a ĝis la 2-a h. de la sekvanta tago, la Ĉina Centra Televida Stacio prove elsendis al la tuta lando artan vesperon el kantoj, dancoj, humuraj dialogoj, lokaj operoj, akrobataĵoj kaj aliaj spektakloj prezentitaj de centoj da aktoroj el la ĉeftero de Ĉinio, Taiwan kaj Hongkong. Neatendite, ĝi akiris grandan sukceson kaj vekis fortan eĥon en- kaj eksterlande. Ĝis hodiaŭ tiaj vesperoj jam okazis 17 fojojn. Kvankam iliaj similaj formoj vekis ian malkontenton, tamen por ĉinoj tio jam fariĝis nemankigebla antaŭvespere de la Printempa Festo. Kaj por la ĉi-jara oni ekpreparis ĝin jam en septembro de la pasinta jaro.

KANALO POR POPULARIGI SCIENCON KAJ EDUKON

En Ĉinio sufiĉe multaj televi-

dantoj loĝas en kamparo. Pro relative subevoluinta ekonomio kaj maloportuna trafiko multaj kamparanoj tre malofte vizitis alian lokon. La popularigo de televido ebligis al ili koni la prosperan mondon ekster ilia hejmloko. Tio iagrade influis iliajn koncepton kaj vivon.

Televidado ja estas ĉefa amuziĝo por plejparto de la kamparanoj kaj nemalmultaj el ili akiris pere de televido utilajn agronomiajn sciojn, teknikon kaj informojn por sin riĉigi, pro tio televidaj stacioj de diversaj lokoj elsendas programerojn speciale por kamparanoj, ofte faras fakajn temojn pri kamparo kaj diskonigas sciencajn agronomiajn sciojn. La Ĉina Centra Televida Stacio starigis frekvencan kanalon por kamparanoj kaj senpage faras reklamojn por agrikulturaj produktoj kun la celo helpi al kamparanoj plilarĝigi la ekonomian vojon. Ĝis la fino de la kuranta jarcento Ĉinio realigos la celon, ke en ĉiuj vilaĝoj oni ĝuos televidon, kio estas utila ankaŭ al la kamparanoj vivantaj en foraj vilaĝoj.

La televidado estas utila ankaŭ al edukado. La televida universitato ne bezonas klasĉambron. Ĝiaj instruistoj instruas en televido kaj lernantoj lernas pere de televido hejme. Miloj kaj miloj da lernantoj, kiuj malsukcesis en ekzamenoj por altlernejo, finis sian lernadon tiamaniere, sukcesinte en ekzamenoj egalaj al tiuj de teknika lernejo, altlernejo k.a. Por kontentigi la bezonon de diversaj televidantoj la Eduka Televida Stacio funkciigas diversajn kursojn, kiaj gvidado de lecionoj por elementa kaj mezgrada lernejoj, tiu de ekzamenoj por altlernejo; trejnado de teknikaj kapabloj pri komputilo kaj riparado de elektraj aparatoj; edukado pri medio, administrado de modernaj entreprenoj ktp.

En Ĉinio la televidaj aferoj havas brilan perspektivon. ■

La tuta familio televidas.



Ŝanĝiĝo de loĝkondiĉoj



de HU YUN

NUN eĉ pekinanoj miris pri granda ŝanĝiĝo de sia antikva urbo: alte starantaj domegoj anstataŭis tiujn kadukajn loĝdomojn, kaj la vojetoj jam fariĝis larĝaj stratoj pavimitaj.

EKSPANSIO DE PEKINO

La konstruistoj, kiuj partoprenis konstruadon de Pekino, bone scias ĝian grandan ŝanĝiĝon. Sinjoro Xu Yinpei, ĉefarkitekto de la Ĝenerala Pekina Urbokonstrua Korporacio, konigis al mi, ke la plankareo de loĝdomoj konstruitaj de lia korporacio de post la fino de la 70-aj jaroj estas pli ol 14 milionoj da kvadrataj metroj, preskaŭ kiom tiu antaŭ 30 jaroj. Nun la korporacio ĉiujare finkonstruas loĝdomojn de 700 000-800 000 kvadrataj metroj.

Kiel 43-jara pekinano, mi ne estas klara pri tio, tamen propraokule vidas la ekspansion de Pekino. Kiam mi estis infano, mi kaj miaj familianoj loĝis en movoplena komerca kvartalo de Pekino, poste ni transloĝiĝis al la orienta antaŭurbo de Pekino, kiu siatempe en miaj okuloj estis tre izolita kaj malproksima de la urbocentro, pri tio ni sentis bedaŭron. En la sekvantaj dekelkaj jaroj la loko prosperiĝis, kaj ni ne plu sopiras la malnovan loĝejon.

MALAPERO DE LA URBOCENTRO

Pekino estas antikva urbo. Por konservi ĝiajn originajn trajtojn kaj protekti ĝiajn antikvajn

konstruaĵojn, oni konstruis novajn loĝdomojn ĝenerale ĉe antaŭurbo, kaj ilia alteco estis limigita laŭ ilia distanco de la urbocentro. Kun disvolviĝo de trafiko la novaj loĝdomoj kun multaj avantaĝoj estas tre ŝatataj de urbanoj.

En la 50-aj jaroj plejparto de la pekinanoj loĝis en unuetaĝaj domoj, ankaŭ mia familio havis tian domon en kvadrata korto. Se la korto apartenus nur al mia familio, tio estus bona, tamen tiam pro



S-ro Yu Linshan

manko de loĝdomoj, vivis en la korto eĉ pli ol 10 familioj kun kelkdek anoj. En la limigita spaco oni ofte malpaciis pro bagateloj. Mia familio havis du ĉambrojn, tamen post naskiĝo de miaj junaj gefratoj la ĉambroj fariĝis malvastaj por ni, ke ni devis transloĝiĝi al la nova loĝdomo.

en Pekino



Fangzhuang-plansetlejo

Inter la 50-aj kaj 70-aj jaroj, pekinanoj urĝe bezonis loĝdomojn. Tiam oni malmulte konsideris la medion kaj kondiĉojn de loĝado. Sed nun pekinanoj postulas altkvalitan loĝdomon kun bela ĉirkaŭaĵo kaj oportuna trafiko.

Sinjoro Xu diris, ke lia korporacio jam konstruis pli ol 50 domblokojn, kvankam plejparto de tiuj estas malproksime de la urbocentro, tamen pro tio, ke en ili estas vendejoj, lernejoj, infanĝardenoj, aleoj pavimitaj kaj bela ĉirkaŭaĵo, preskaŭ ĉiuj apartamentoj estis menditaj eĉ antaŭ la finkonstruiĝo.

FANGZHUANG-PLANSETLEJO

“Fangzhuang-plansetlejo kun 21 300 familioj, kiu areos 2.66 milionojn da kvadrataj metroj, estis konstruita en la komenco de la 80-aj jaroj,” diris s-ro Yu Linshan, direktoro de la Unua Kompanio de la korporacio. Ĝi estas unu el la plej fruaj plansetlejoj de

Pekino kaj ankaŭ la unua konstruita de tiu kompanio. La plansetlejo dividiĝas en kvar partojn komunikitajn per larĝaj vojoj kaj havantajn sufiĉe da instalaĵoj, kiuj servas al la loĝantoj. Krom elementaj kaj mezgradaj lernejoj, en la plansetlejo estas ankaŭ artaj kolegioj bonvenaj al infanoj.

En la plansetlejo mi rimarkis, ke estas konstruata stadiono, inkluzive de futbalejo, normaj kurejoj, tenisejo, flugpilkejo kaj korbopilkejo. Tio ne nur havigos al la loĝantoj sportejon, sed ankaŭ allogos novajn aĉetantojn de domoj.

PLI BONA STRUKTURO

Krom bela ĉirkaŭaĵo, oni deziras nun ankaŭ sciencan strukturon de loĝdomo. Kiam ni transloĝiĝis al la nova domo, ni ja ĝojis pri la loĝejo kun kuirejo kaj necesejo, tamen nun la apartamento jam perdis sian allogon. La nove konstruitaj apartamentoj havas pli sciencan strukturon — vestiblo kaj salono, tute malsame ol la malnovaj. Kaj ĉambro-aranĝoj estas pli raciaj: du aŭ tri dormoĉambroj kun gastoĉambro kaj manĝoĉambro, kaj pli granda apartamento havas eĉ du aŭ tri necesejojn.

La ĉina proverbo diras: “Havi komfortan domon, vivi plezurajn vivon.” Kompare kun la pasinteco, la loĝkondiĉoj en Pekino multe boniĝis. Sed la domkonstruado ne povas kontentigi la bezonon de ĉiuj urbanoj. Post nelonge la korporacio prezentos al pekinanoj alian loĝblokon — Wangjing. ■



Loĝantoj de la plansetlejo

Reaperigo de antikvaj lignaj bovoj

de ZHANG HAIFENG

EN la fama ĉina romano "Tri Regnoj" oni priskribis lignajn bovojn: kiam la armeo de Shu-regno atakis Wei-regnon, ĝi renkontis grandajn malfacilojn en transportado de provianto, tial Zhuge Liang, la ĉefkomandanto de Shu-armeo, kreis lignajn bovojn, per kiuj oni tre facile transportis provianton, ĉar tiaj bovoj ne bezonis trinkadon, manĝon, nek ripozon, tial oni uzis ilin oportune.

La priskribo pri la lignaj bovoj havas ateston en historiaj libroj, de kio oni scias, ke la kreo de la lignaj bovoj estis vera, sed ne iluzia. Tamen por la posteuloj ili estas enigmo. Kio estas la tiel nomataj lignaj bovoj? Pri tio oni ĉiam havis malsamajn opiniojn. Iuj diris, ke tio estis unurada ĉarumo. La 57-jara supera inĝeniero Wang Jian

de la Mekanika Instituto de la Mekanisma Fakultato de la Xinjiang-a Politekniko opinias, ke tio ne estis ĉarumo, sed bovforma kvarpieda maŝino ĉevale iranta. S-ro Wang elfaris modelon de ligna bovo.

EN LABOREJO DE S-RO WANG

La laborejo de Wang konsistas el du partoj: la ekstera estas laboratorio, kie estas tornilo, borilo kaj ligno. Kvankam la laborejo estas malgranda kaj simpla, tamen bonorda. La interna ĉambro estas kompare malgranda. Ĝi funkcias kiel kabineto de Wang. Sur tablo estas diversaj libroj.

Ĝuste sub tiaj kondiĉoj Wang diligente laboris dekojn da jaroj. La fruktoj de lia esplorado jam atingis rimarkindan nivelon kaj el liaj fruktoj la plej grava estas reaperigo de la lignaj bovoj priskribitaj

en la romano "Tri Regnoj".

En la politekniko mi vidis la modelon de lignaj bovoj, kiuj havas bovan formon kun du teniloj poste por teni la ekvilibron kaj direkton kaj interne estas ŝafta strukturo. Delikate puŝate aŭ tirate, ĝi moviĝas per siaj kvar piedoj, kiuj kruciĝas, kurbiĝas, leviĝas kaj moviĝas, tial ĝi povas iri laŭ la ĉevala irmaniero. Ĝia paŝado estas akorda, facila kaj libera.

La ĉevala irado diferencas de la bova. Irante, la bovoj subtenas sin per tri piedoj kaj per la kvara faras antaŭenpaŝojn, dum la ĉevaloj per du piedoj subtenas sin kaj per la aliaj du igas sin antaŭen, kio faras diagonalan manieron. La nomitaj lignaj bovoj kreitaj de Zhuge Liang ja ĝuste iris per ĉevala irmaniero kaj transportis pezaĵojn facile.

La modeloj faritaj de s-ro Wang Jian similas al tiuj priskribitaj en la historiaj libroj forme kaj funkcie. Kvankam ili estis faritaj surbaze de profunda teorio, kiu tamen estis ebla antaŭ 1 700 jaroj, kiam vivis Zhuge Liang.

En 1986 la tri lignaj bovoj faritaj de Wang Jian estis transportitaj de Xinjiang al Hanzhong de Shaanxi-provinco, kie militistoj de Shu-regno trejniis sin por la batalo kontraŭ Wei. Kiam ili iris sur antikva vojo, kie Zhuge Liang per la lignaj bovoj transportis grenon, oni sentis, ke la tempo retrovis sin en la tempo antaŭ 1 700 jaroj.

ESPLORADO EN LA ANTIKVA MEKANIKO

Wang diris, ke jam en sia knabeco li forte interesiĝis je la antikva mekanismo. Samkiel aliaj knaboj li amis rakontojn pri la tri regnoj.

Wang Jian kaj lia ligna ĉaro reproduktita



Foje li informiĝis pri la mirindaj lignaj bovoj kaj raviĝis je tio. Li diris, ke tiuj rakontoj ludis rolon de edifa materialo por lia posta studo.

Kiel filo de kamparano, li havas profundan amon al la kampo kaj samtempe li amas mekanismon, tial post abiturientiĝo li eniris en la Pekinan Mekanikan Instituton (t.e. la nuna Pekina Agronomia Inĝenieria Universitato).


En siaj studentaj jaroj li elektis por si du esplorajn temojn: la unua estis agronomia mekanismo kaj la dua — malpliigi la homajn morton kaj vundiĝon en milito. Li deziris fari robotojn, kiuj povas anstataŭi homojn en batalo. Liaj ideoj devenis de lia denaska humanismo.

Post diplomiĝo el la instituto li eklaboris en la Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Xinjiang, kie li tutanime esploris la antikvan mekanismon. En 1985 li komencis labori en la Xinjiang-a Politekniko, kiam lia esplorado jam atingis altan nivelon kaj en marto de la sama jaro li elfaris sian unuan lignan bovon. Post tio li turnis sin al studo pri lignaj ĉaroj kaj ĉevaloj de Lu Ban, kiuj havis striktan rilaton kun la lignaj bovoj de Zhuge Liang. En 1991 li sukcese elfaris lignajn ĉaron kaj ĉevalon perditajn antaŭ pli ol 2 400 jaroj. Jen antaŭ ni aperis ligna ĉevalo tiranta ĉaron. Ili povas mem iri suben sur deklivo.

Antaŭ kelkaj jaroj Wang Jian publikigis disertacion "Pri kopio de la kompasa ĉaro de Huangdi perdita antaŭ 4 600 jaroj kaj sis-mografo de Zhang Heng perdita antaŭ 1 700 jaroj". Li inventis ŝaftan irmaŝinon, kiu havas grandan ekspluatan latenton, irroboton k.a. Nun li plenenergie kopias la sis-mografon de Zhang Heng.

LI STUDAS POR LA HODIAŬA UTILIGO

S-ro Wang akiris grandan sukceson dank' al pli-ol-40-jara studo de la antikva mekanismo.



Ligna bovo

Lia studo diferencas de la kutimaj. Li donis grandan atenton al esplorado pri iuj perditaj, malfacilaj maŝinoj. Li diris, ke en la specifaj inventoj certe estas iuj apartaj malfaciloj kaj por la sukcesoj estas nemankigebla la nerutina pensmaniero.

Kiam Wang laboris en la Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Xinjiang, li projektis "strangan" kombajnjon per sia eksterordinara pensmaniero. Poste, kiam iu de la fabriko oficejojaĝis al la Pekina Instituto de Agrikultura Mekaniko, li informiĝis, ke tie estis fakulo, kiu projektis modelon tre similan al tiu de Wang. Kiam la fakulo informiĝis pri sukcesoj de Wang, li skribis al Wang por interŝanĝi sperton, li trovis, ke ĉi-kampe Wang iris pionire. Eĉ hodiaŭ la plano de la projekto de Wang restis avangarda.

Troviĝas ankaŭ iuj, kiuj neglektas la studon de Wang pri la antikvaj maŝinoj. Sed Wang havas sian propran vidpunkton. Li diris: "La tradiciaj objektoj povas esti heredataj milojn da jaroj certe pro siaj avantaĝoj."

S-ro Wang faras esploradon ĉiam kun klara celo servi al la aktualeco. Montrante foton de roboto kreita en 1971, li diris: "Tion mi faris laŭ antikva mekanismo,

kaj nun oni povas manipuli ĝin per elektronika tekniko. Ĝi povas ludi sian rolon en nia aktuala vivo."

Profiti de la sciencaj fruktoj kaj per ili doni riĉaĵojn al la socio ja estas urĝa bezono por Wang. Li diris, ke li akiris apartan kreivecon en la studo pri antikva mekanismo kaj nun li povas ekspluati multajn varojn.

"Se mi havas kapitalon, mi povas fabriki centojn da specoj da varoj, kaj nun mi urĝe bezonas kapitalon," li diris.

Wang deziras fari la lignajn bovojn kaj kompasajn ĉarojn infanaj ludiloj aŭ metiartaĵoj kaj vendi ilin sur la merkato.

En la laboratorio de Wang mi vidis pafilsimilan muŝbatilon, aparaton por preventi gaslikadon, k.a. Ĉiuj ĉi povas esti vendataj post ioma modifado.

Sen persista studo Wang ne povus atingi la nunajn sukcesojn. Wang diris, ke la antikva mekanismo forte interesis lin. Li diris: "Mi sentas, ke nun mi povas interparoli kun antikvaj eminentuloj almenaŭ psike. Mi fieras je tio. Eĉ se mi mortus morgaŭ, mi estus kontenta, ĉar mi restigis iujn valorajn objektojn al la socio. Mi ĉiam okupas min je mia ŝatata afero. Mi estas kontenta je tio." ■

La Suda Katedralo en Pekino

de AN TANG

LA Suda Katedralo kun longa historio situas en la urbocentro de Pekino. En la katedralo regas kvieteco, kontraste kun ekstera bruego.

La Suda Katedralo konsistas el du partoj. En la orienta korto estas la katedralo kun duonsfera kupolo en roma stilo, en kiu sidas altaro de Jesuo kaj troviĝas pli ol mil sidlokoj. En la okcidenta korto estas artefarita monteto, altaro de Maria kaj salono, kie oni akceptis multajn gravajn gastojn kaj religiajn gvidantojn.

Horo



ENKONDUKIĜO KAJ KRESKO DE KATOLIKISMO

La Suda Katedralo estas unu el la 17 katedraloj en Pekino. En 1601 fama itala predikisto Matteo Ricci venis al Pekino. Konforme al adoro de ĉinoj al konfuceanismo, li ellaboris principon de la predikado "unuiĝi kun konfuceanismo", "aldoni al konfuceanismo" kaj "superi konfuceanisman". Li kaj aliaj predikistoj vestis sin kiel konfuceanoj, primajstris la ĉinan lingvon kaj konis sciencajn sci-ojn, precipe pri astronomio, kalendaro kaj matematiko. Ĉar li faris multajn laborojn por interŝanĝo de

la orienta kaj okcidenta kulturoj, li ricevis la permeson de la kortego konstrui katedralon en la urbocentro de Pekino, t.e. la Sudan Katedralon. Fama germana pastro Johann Adam Schall von Bell loĝis tie post 1640.

En la komenco de la 50-aj jaroj de tiu ĉi jarcento la ĉina katolikismo suriris la vojon sendependan kaj sinprovizan.

De post la 80-aj jaroj oni starigis en Ĉinio 5 000 katedralojn, kaj multe kreskis la nombro de katolikoj.

JUNAJ PASTROJ LUDAS GRAVAN ROLON

Dum la kultura revolucio (1966-1976) multaj katedraloj detruigis kaj malmultiĝis pastroj. En 1979 oni remalfermis la Sudan Katedralon kaj akceptis en- kaj eksterlandajn katolikojn.

En 1980 fondiĝis katolikisma seminario en la pekina diocezo. De 1986 ĝis nun ĝi kulturis pli ol 40 junajn pastrojn. En ĉiuj katedraloj de Pekino sacerdotoj estas junaj, inter kiuj sacerdoto Zhao Qinglong de la Suda Katedralo estas 29-jara, tre kapabla en pastreco kaj administrado.

Kiel multaj aliaj katedraloj en Ĉinio, ĉiumatene



Katolikoj



La Suda Katedralo en Pekino

de la 6-a ĝis la 8-a la Suda Katedralo faras tri mesojn gvidatajn de unu pontifiko kaj ok pastroj. Krome, ili gvidas ankaŭ aliajn sakramentojn, ekz. geedziĝa meso kaj medita meso. Iatempe ili faras servojn ekster la katedralo, kiel beno por nova aŭto aŭ nova loĝdomo kaj vizito al malsana katoliko. Pro tio, ke multiĝas fremduloj laborantaj en Ĉinio, je la 10-a ĉiudimanĉe ili faras anglalingvan meson en la Suda Katedralo.

Kun multiĝo de pastroj la pekina diocezo subtenata de la registaro starigis kuracejon kaj maljunulejon. Ying Mulan, direktoro de la kuracejo, estas monaĥino de alta deveno. Ŝia avo Ying Xiyuan estis eminenta katoliko, kiu fondis Furen-universitaton. Ying Mulan lernis medicinon en sia juneco kaj iam laboris en hospitalo en Ŝanhajo. En 1984 ŝi venis al la Suda Katedralo kaj fondis du kuracejojn, kiuj pagigas malpli

multe ol aliaj hospitaloj.

“NESINCERA ESTAS AGO SEN AMO”

La 70-jara pastro Sun Shang'en diris: “Nesinceraj estas kredo sen ago kaj ago sen amo.”

Estas du katolikaj vilaĝoj en antaŭurbo de Pekino. Respektive 85% kaj 100% de iliaj loĝantoj kredas je katolikismo. La katolikoj vivas malfacile en Housangyu-vilaĝo. La pekina diocezo importis 100 mil juanojn kaj uzis la monsumon por havigi al la vilaĝo motorpumpman puton kaj aĉetis al la vilaĝanoj pli ol 2 000 librojn por starigi bibliotekon. Predikante, la pastroj propagandis, ke hazardludo kaj toksikomanio estas danĝeraj kaj oni devas eviti ilin. Kaj tio ricevis bonan efikon.

En la pekina diocezo ankaŭ organiziĝis ĥoro, kiu plejparte prezentas katolikajn kantojn, kaj estis plurfoje invitita de aliaj lan-

doj. La pastroj fondis por malsukcesintoj en la altlernejaj ekzamenoj Kolegion de Xiangbo (oni donis la nomon al la lernejo por memori la forpasintan faman pastron kaj edukiston Ma Xiangbo).

Nun en Ĉinio oni aliĝas al katolikismo ĝenerale per familia heredo aŭ rekomendo de amikoj.

Pastro Sun Shang'en diris, ke nun iom pli multiĝis intelektuloj, kiuj kredas je katolikismo. En intervjuo mi trovis, ke inter novaj katolikoj iuj komence studis katolikismon kiel kulturon kaj nur iom post iom fariĝis ĝiaj kredantoj, kaj aliaj adeptiĝis por koni la valoron kaj koncepton de homa vivo.

Nun estas 50 mil katolikoj en Pekino. Kaj adeptiĝas 5-6 cent homoj ĉiujare. Dum ĉiutaga meso, la katedraloj pleniĝas de katolikoj. Vespere de Kristnasko tie svarmas homoj. Ankaŭ multaj gejunuloj ŝatas okazigi tie sian geedziĝan ceremonion. ■

Ĉin-medicina kuracado de sendormeco

SENDORMECO estas malsana stato, pro kio oni malfacile endormiĝas kaj facile vekigiĝas post endormiĝo kaj elvekiĝinte oni malfacile endormiĝas denove aŭ dormas delikate. Sendormecon ofte akompanas sonĝo, kapturino, maltrankvilo, facila laciĝo k.a.

Sendormecon povas kaŭzi fiziologiaj, patologiaj, psikologiaj kaj medikamentaj faktoroj. Laŭ ĉin-medicina teorio la psika traŭmato povas damaĝi hepton, kio kondukas al malglata cirkulado de la vitala energio kaj sango en la homa korpo kaj sekve de tio oni suferas de maltrankvilo; troa laco peze ŝarĝas la koron kaj lienon, kio kondukas al manko de la vitala energio kaj sango kaj konstanta psika laco kaj plie ankaŭ senileco, longa malsano kaj malsobra manĝado povas kaŭzi sendormecon. Laŭ la teorio de la ĉina medicino oni





kuracas malsamspecan sendormecon per malsamaj metodoj, tamen la ĝenerala principo estas sama, t.e. ĉefe kvietigi la malsanulojn kaj aldone doni medikamentojn utilajn al sango, hepato, stomako kaj forigi varmon laŭ malsamaj specoj respektive.

En Ĉinio oni uzas multajn receptojn kontraŭ sendormeco: A. Baku 15 gramojn da kerno de sovaĝaj jujuboj, pulvorigu kaj dekoktu ilin. Trinku la dekoktaĵon ĉiutage unufoje. B. Dekoktu 30 lotussemojn, saletu la dekoktaĵon kaj trinku ĝin ĉiutage unufoje. Ambaŭ receptoj estas efikaj por kuraci sendormecon. Tamen niaj legantoj vivas en malsamaj landoj kaj havas malsamajn kutimojn en la vivo. Ni ne scias, ĉu ili povas trovi tiujn drogojn. Do ni konigos iujn facile praktikeblajn metodojn.

1. Kuŝu surdorse la malsanulo kaj vi, la masaĝanto, per palpa flanko

de la dika fingro masaĝu la malsanulon. Komencu la masaĝon de la akupunktura punkto *jingming* ĉe la interna angulo de la okuloj, tra la akupunktura punkto *tongziliao* ĉe la ekstera angulo de la okuloj kaj fine ĝis la tempioj. Faru tion delikate, milde kaj rapide 50-100 fojojn. Prem-knedu la akupunkturajn punkton *baihui* kaj la ĉirkaŭajn lokojn 3 minutojn.

2. Pinĉ-knedu la akupunkturajn punktojn *pangguangshu* ambaŭflanke de la meza linio de la dorso de la malsanulo de supre malsupren 3-5 fojojn. Faru tion ne tro forte por ke la malsanulo estu kom-



forta.

3. Premu la akupunkturajn punktojn *shenmen* kaj *neiguan*, frot-knedu la punktojn *zhongwan* kaj *qihai*, premknedu *zusanli* kaj *sanyinjiao*, frotu la punkton *yongquan* sur la piedplato po unu minuto.

4. Se la malsanulo multe sonĝas, facile vekiĝas el la dormo, suferas de palpacio, forgesemo, konstanta laco, paleco de la vizaĝo, paleco kaj maldikeco de la saburo kaj malforta korbato, vi do devas fari jenajn masaĝojn aldone:

(1) Sidu la malsanulo kaj vi, la masaĝanto, staru flanke de li, per

unu mano kaptu lian ŝultron kaj per la alia frotu lian bruston dekstren maldekstren kaj de supre malsupren 5-10 fojojn kaj post tio frotu la dorson la samajn fojojn.




(2) Sidu la malsanulo kaj vi, la masaĝanto, staru malantaŭ la masaĝato iom fleksante la genuojn. Metu viajn du manojn en la akselojn de la malsanulo. Frotu ilin de supre malsupren 10-15 fojojn.

5. Se oni suferas de malfacila endormiĝo kaj ekscitiĝemo, malkomforto de la stomako kaj ventro, mallakso, dikeco de la saburo, vi povas fari jenajn masaĝojn aldone:

(1) La malsanulo kuŝu surdorse kaj vi, la masaĝanto, sidu apud li kaj puŝu vian dikan fingron sur la apunkturajn punktojn *zhongwan*, *qihai*, *guanyuan* kaj *tianshu* de supre malsupren 5-10 fojojn.

(2) La malsanulo kuŝu surdorse kaj vi, la masaĝanto, metu unu manplaton sub la umbilikon de la malsanulo kaj per ĝi frotu livume la lokon ĉiam pligrandiĝantan 3-5 minutojn.

Faru la suprajn masaĝojn ĉiuvespere, duonhoron pli frue ol enlitiĝo. Kaj krome la suferantoj devas lavi siajn piedojn per varmeta akvo ĉiuvespere. ■



(Daŭrigo de p. 35)

legis laŭ ŝia mieno, ke ŝi havas malfacilon. Mia patrino elkestigis kelkajn medikamentojn. Ŝi elpoŝigis monujon kaj diris al la mezaĝulino: "Sinjorino, videblas, ke vi ne estas bonhava. Hodiaŭ mi ne havas multe da mono ĉe mi kaj tiu ĉi sumo eble sufiĉas por la morgaŭa kuracado. Se vi bezonos ion, turnu vin al mi." Dirinte tion, mia patrino iris el la domo.

La kortuŝita mezaĝulino povis diri nenion. Post momento ŝi kvazaŭ subite vekiĝis el profun-

da dormo kaj postkuris nin.

"Ho, doktoro, la monon mi ne devas akcepti! Mi kore dankas vin pro via kuracado." Larmoj senĉese elruliĝis el ŝiaj okuloj.

Mia patrino nur svingis la manon kaj kun granda malfacilo trenis siajn piedojn al la hejmo. Mi vidis, ke ŝi estas kolapse laca.

Reveninte hejmen, mia patrino sentis sin pli malbone. Ŝi prenis medikamenton kaj dronis en komato. En la sekvanta mateno, kiam ŝi vekiĝis, ŝiaj unuaj vortoj estis: "Iru kaj demandu la virinon, ĉu

ŝi portis la knabon al hospitalo. Se ne, helpu ŝin!"

Kiam mi poste sciigis ŝin, ke la malsana knabo kredeble estas en kuracejo, ĉar la pordo de lia hejmo estas ŝlosita, ŝi faris longan elspiron.

La afero ja estas malgranda, kaj plie, ĝi okazis antaŭ multaj jaroj, tamen ĝi estas neforgesebla por mi. Inspirite de ŝia edukado, mi diligente laboras. Mi dankas mian patrinon, kiu edukis min kiel homon en la vera senco de tiu ĉi vorto. ■

(Daŭrigo de p. 28)

lasis sian spuron en la plej orienta, okcidenta kaj norda partoj de Ĉinio kaj skribis 4 milionojn da vortoj pri moroj kaj kutimoj de ĉiuj lokoj, kie li estis. Pro tio li foruzis 54 parojn da ŝuoj...

“Ankaŭ piediri estas hardado,” diris Yu. Plurfaja risiko de morto komprenigis al li, ke la esenco de la vivo kuŝas en konservo de la naturo kaj honesteco. Li ne volis transformi sin en piediran maŝinon. Fininte sian vojaĝon tra Ĉinio, li planis vivi en pitoreska loko por pasigi sian postan duonvicon, komponante emociajn verkojn por si mem. Ĝuste pro plurjara vivo en la naturo lia animo puriĝis: li ne volis vivi en malvasta spaco de la urbo kaj batali pro bagateloj kaj profitoj. Laŭ li la naturo estas plej komforta hejmo.

REVENO AL LA NATURO

Kun memfido Yu marŝis sur la antikva Silka Vojo. Li planis piede trairi ĝian parton en Ĉinio kaj prenis Lopnur en Taklimakan, “Maro de Morto”, kiel la unuan stacion. Lopnur, la plej granda ĉina moviĝanta lago el sala akvo, fariĝis antaŭlonge giganta sala krusto, kaj la antikva regno Loulan, kiu prosperis siatempe ĉe ĝi, mistere malaperis. Somere la tiea klimato estas tro seka kaj la temperaturo superas 45°C, kaj tiu de sablo surtere — 70°C. La loko abundas je sabloŝtormoj, kiuj ofte kaŝas la sunon kaj la lunon, ke la loko teruras kiel diablejo. Iun junian tagon antaŭ dekkelkaj jaroj ĉina sciencisto Peng Jiamu gvidis ekspedicion al la loko kaj malaperis tie. Pro tio junio estis vualita de mistero kaj teruro. Tamen Yu fiksas sian agadon en junio de 1996, esperante efektiviĝi la diron, ke oni ne povas trapasi Lopnur en junio, kaj esplori surloke la geografion kaj klimaton kun la celo fosi kanalon, kiu kondukos neĝan akvon el Kunlun-montaro por reprosporigi Lopnur. Lokanoj malkonsilis lin kaj ankaŭ lia amikino telefonis en malproksimo, ke li ŝanĝu la daton de la vojaĝo, sed li humure respondis: “Ni interkonatiĝis antaŭlonge, tamen ni neniam renkontiĝis. Tion mi ĉiam bedaŭras. Vi ne forgesis tion, kion vi diris en la Tago de Stultuloj, ĉu ne?”

La 45-jara Yu havis senaman edzecon kaj poste li eksedziĝis. Dum la tagoj de migrado lia vireco allogis multajn junulinojn, inter kiuj unu ekvidis lin en sporta programero de televido dum sia lernado en universitato. Tiutempe ŝajnis al ŝi, ke ŝi iros iutage al la lokoj, kiujn vizitis Yu. Poste ankaŭ ŝi fariĝis tutsola piedira vojaĝanto. Ili intimiĝis per telefonado, prizorgante unu la alian, reciprokante salutojn kaj humure ŝercante. Ŝi solene deklaris en la Tago de Stultuloj: “Hodiaŭ mi kaj Yu gefianĉiĝis.” Yu subite rememoris tiun ŝercon. Kun deziro renkontiĝi kun sia “fianĉino”, li diris: “Kiam mi revenos de Lopnur, mi donacos al vi blankan ĉevalon kun Yu Chunshun kiel ĉevalisto.”

Je la 15-a kaj tridek minutoj en la 6-a de junio Yu kaj aliaj naŭ homoj veturis al Lopnur per du aŭtoj, akompanate de lokaj gvidantoj kaj raportistoj el televida stacio, kiuj volis filmi “Moderna Xu Xiake”. Post kvartaga penega vojaĝo ili trapasis Lopnur de oriento al okcidento. Tamen Yu insiste ripetis tion tutsole per piediro. Oni konsentis renkontiĝi en la stabejo tri tagojn poste. Tiumatene Yu eliris el la tendo kaj kantis popolan kanton de Xinjiang: “En malproksima loko estas bona knabino...”

Kvankam oni metis por li sufiĉe da akvo kaj manĝaĵoj en lokoj distancaj po sep kilometrojn, tamen oni ankoraŭ maltrankvilis kaj veturis per aŭto por sekvi lin sub la kruela suno. Tiam en la dezerto estis varmege. Sed Yu ne lasis raportistojn sekvi lin.

Post ilia refoja disiĝo leviĝis 11-grada sabloventego kun varmegaj ondoj. Pro pasado de forta magneta kampo de la tero tra la centro de Lopnur, ne funkciis radiofono kaj rompiĝis interkomunikado. Tri tagojn poste, Yu ankoraŭ ne revenis.

Helikoptero trovis lian bluan tendon en la centro de Lopnur kaj li kuŝis en ĝi kun la kapo al oriento kiel mortintoj en antikvaj tomboj de Loulan. Apud li estis tibeta tranĉileto kaj du fosoj sen akvo.

La suno fandis lin.


POST LIA FORPASO

“La vento mildiĝis kaj la dezerto malvarmiĝis, sed la bravulo ne plu revenos.” Kun sopiro vojaĝantoj skribis tiujn vortojn. Antaŭ la portreto de Yu, iu piedira vojaĝanto, kiu hazarde konatiĝis kun li en Tibeto kaj intimiĝis kun li poste, prezentis per du manoj tason da akvo, dirante: “Fraĉjo, mi bone scias vin, survoje oni plej timas, ke mankos akvo, mi donas akvon al vi...”

La junulino, kiu atendas lian revenon de la dezerto, diris: “Fraĉjo Yu, vi diris, ke vi neniam forgesas rendevuon, sed ĉi-foje vi forlasis ĝin por ĉiam.” La du piediraj geamantoj-vojaĝantoj finfine ne havis ŝancon renkontiĝi. Post granda doloro la junulino starigis klubon de ĉinaj ekspedicianoj. Ŝi decidis sciencigi, popularigi kaj normigi la ĉinan ekspedician aferon, kiu ĵus komenciĝis kaj estas multe postrestinta kompare kun tiu de la evoluintaj landoj.

Post dolorego la 70-jara patro de Yu fondis la Ekspedician Fonduson de Yu Chunshun kun 100 mil juanoj, kiom asekura kompanio kompensis por Yu. Li decidis daŭrigi la vojon de la filo kaj plenumi esploradon de la fontoj de Yangzi-rivero kaj la Flava Rivero...

Hodiaŭ ĉinoj havas multajn vivmanierojn kaj ĉiu volas vivi laŭ sia karaktero kaj plaĉo. Kvankam ne estas multaj kiel Yu, tamen lia forpaso lumigis al multaj, kiuj kontentiĝas kun la vivo: en la mondo estas eĉ tiuj homoj, kiuj vivas tiamaniere. Pro tio ekspediciado fariĝos pli alloga. ■



Statuoj en ŝtonkavernoj de Maiji-monto

Ŝtonkavernoj de Maiji-monto troviĝas sudoriente de Tianshui, Gansu-provinco, nordokcidenta Ĉinio. Oni faris ŝtonkavernojn kaj statuojn sur la monto de la Posta Qin-dinastio (384-417) ĝis Qing-dinastio (1644-1911). Nun tie estas 194 kavernoj, kiuj dense viciĝas sur la krutaĵo kiel ĉelaro. Sennombraj statuoj estas vivoplenaj en grandeco de homo. Iliaj graciaj figuroj montras la lertan teknikon de la metiistoj de la antikva Ĉinio. La ŝtonkavernaro estas laŭdata kiel "muzeo de orienta skulpturo". La poŝtmarkoserio el ses pecoj estis emisiita de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio en 1997.



Kokosarboj ĉe la Suda Ĉina Maro

Foto de GAO MINGYI

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语《中国报道》一九九九年第五期
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2